

# ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Malfortoj kaj  
mirakloj en  
Ameriko**



**Influo 17:  
Kampanji en  
propra vilaĝo**



**UEA nun  
en specialaj  
konsultaj  
rilatoj kun UN**



**Iranaj rozoj kreskas kune**



# Vi trovos...

## 121 Malferme

### La devo nin aŭdigi

Mark Fettes

## 122 UNUECO KREOS VIGLON EN IRANO

Intervjuo kun  
M. Reza Torabi

*"En la movado  
de nia lando  
ni bezonas  
plurismon, sed  
ne anarkion."*



Komplezo de IREJO

## 124 Ameriko

### De Kordileroj al karnavalo

Amri Wandel

### La lando kie mirakloj okazas

Giuseppe Grattapaglia

## 126 Eksteraj rilatoj

### PLI FIRMA POZICIO DE UEA ĈE UN

Osmo Buller

*UN asignis al UEA la  
statuson de specialaj  
konsultaj rilatoj.*



Unuigintaj Nazioj

### "Ne" al radikala propono

## 127 Junularo

### TEJO — ĉu por lingvaj rajtoj?

Anna Ritamäki

### Nova KER-manlibro

Miquel Gómez i Besòs

## 128 KALENDARO 1998-99

*Jam somere ekplanu por la vintro!*

## 131 Influo n-ro 17

### 3-a IASI, pri intervjuoj

## 132 "Mikrokampanjo 2000": Subskribis 200 el 4000

## 134 La angla, ĉu sola lingvo por EU?

## 135 REAGJOJ

## 136 RECENZOJ

Leopoldo Knoedt pri **Vivo de Prometeo**.

Jouko Lindstedt pri **Aminda**.

MAO Zifu pri **Taglibro de Anne Frank**.

## 138 Michel Duc Goninaz pri La besto de Vakareso. Fabienne Berthelot pri Vivprotokoloj 1.

## 139 LASTE APERIS



# Kaj plue...

## 140 LOKE, FAKE

## 142 PERSONE OFICIALA INFORMILO

## 143 ANONCETOJ

## 144 NEKROLOGOJ

**La kovrilo:** Floroj tipaj de Irano, ĉi tiuj rozoj simbolu la esperigan freŝecon de la irana E-movado. (Foto: F. Veuthey)

**Malferme:** Flagoj flirtas antaŭ la konstruaĵo de la Unesko-sekretariejo en Parizo. (Foto: Unesko/R. Lesage)

# ESPERANTO

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio  
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.

Grafiko: Francisco L. Veuthey.

Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2060, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la Centra Oficejo:

Pasquale Zapelli.



## LA DEVO NIN AŬDIGI

Kiam mi redaktis ĉi tiun revuon, antaŭ kelkaj jaroj, mi organizis enketon inter nia membraro. Krom sociologiaj indikoj pri aĝo, edukiteco ktp, ni demandis pri ŝatataj servoj kaj movadaj celoj. La okcento da respondintoj atribuis elstaran prioritaton al la eksteraj rilatoj de UEA.

Hodiaŭ, post sesjara okupiĝo pri tiuj rilatoj, mi eĉ pli aprezas kaj dividas tiun sintenon. En la internacia ĥorego, la voĉo de UEA agordiĝas al io malofta: al *pozitiva socia fakto*. Tiom da organizoj aksas sian agadon ĉirkaŭ la malbono en la mondo: lezoj de homaj rajtoj, krizoj de milito, malsato, medidetruo... Multaj aliaj volas reformi la politikan aŭ socian ordon, sed ne proponas ion kio ŝanĝus la vivrealon de nuntempuloj. UEA, kontraste, reprezentas funkciantan sistemon de homa interkompreno, jam malfermitan al ĉiuj kiuj volas ĝin sperti.

Tio donas al la eksteraj rilatoj de UEA duflankan karakteron. Neeviteble, unu konstanta celo estas agnoskigi la ekziston de Esperanto kaj atentigi pri la kulturaj kaj homaj valoroj ligitaj al ĝi. Tio estas ĉiam la pli facila flanko de la laboro, kiel videblas en la du Unesko-rezolucioj, aŭ (se preni ekzemplon ekster la UEA-vicoj) en la pli lastatempa agnosko ĉe Internacia PEN-Klubo: rekonante Esperanton kiel socian fakton, tiaj organizoj zorge evitas pli vastajn lingvopolitikajn konkludojn. Ke esperantistoj atribuas tiom da signifo al tiaj gestoj, atestas frapan mankon de memfido. Finfine ni

ne bezonas Uneskon por konstati ke Esperanto funkcias, aŭ PEN por konscii pri ĝia atentinda literaturo!

Por mi, almenaŭ, tiaj eksteraj agnoskoj de la Esperanta realo havas sencon nur kiel ŝtupoj al dua, pli defia celo: persvadi ĉiam pli da homoj formeti siajn timojn pri ali(lingv)uloj, favore al rilatoj de egaleco, amikeco kaj solidareco. Tiurilate UEA fidelas al sia fondinto Hector Hodler, por kiu la praktika kaj ideala flankoj de Esperanto estis nedisigeblaj. Iuj el niaj intelektuloj pretendas vidi en klopodoj disvastigi la idealon ian malĝentilan predikemon al niaj kunhomoj. Mi, male, sentas tion morala devo. Estas mistrafe imagi la esperantistaron kvazaŭ izolitan de la ĉirkaŭa mondo. Ni ne konsistigas ian memsufiĉisman etnon aŭ socion aŭ civiton; ni estas komunumo, jes, sed komunumo interplektita kun arego da aliaj komunumoj lokaj, etnaj, naciaj, translimaj de ĉiuj specoj, ampleksantaj en fina analizo la tutan homaron.

Pro tio, la problemoj de la homaro estas ankaŭ niaj problemoj. Kie Esperanto povus kontribui al ilia solvo, tie ni havas la devon aŭdigi nian voĉon. La legantoj de ĉi tiu revuo sendube jam konstatis ke UEA ĉiam pli energie serĉas konkretajn formojn de kunlaboro ekster la movado, sur la kampoj de homaj rajtoj, kulturo kaj evoluigo, eduko k.s. Evidentiĝas ke ni disponas pri scioj kaj spertoj unuope maloftaj, plurope unikaj — kaj tial ege valoraj. La internacia vivo iĝas pli riĉa pro nia partopreno. Kaj ĉar temas pri *partopreno*, pri vivoplena dialogado kaj kunagado kun aliaj — tiu engaĝo pliriĉigadas ankaŭ nin mem.

Mark Fettes



### *Kion vi faras en via neesperantista vivo?*

Antaŭe mi laboris en bazon kaj en mia privata vendejo, sed en 1995 mi forlasis tiun laboron kaj pli ekinteresiĝis pri komputado. Nun mi funkcias kiel kompostanto kaj intencas fondi eldonejon. Fakte, Esperanto ŝanĝis (aŭ korektis!) mian vivmanieron, kaj mia laboro estas jam tiel intermiksita kun Esperanto ke ŝajne mi ne povus forkuri de ĝi!

### *Kiel, kiam vi ekmovadis?*

En 1984, kiam mi estis mezlerneano, mi konatiĝis kun la nomo Esperanto pere de ĵurnala anonceto pri koresponda kurso de d-ro Hossejn Vahidi. Plena de entuziasmo, mi sendis leteron al li kaj mendis Esperanto-lernolibrojn. Lerninte la lingvon mi ege miris ke en nia lando, ŝajne, ne ekzistas E-movado. Ekde mia konatiĝo kun Esperanto ĝis mia unua kontakto kun e-istaj samlandanoj pasis 7 jaroj!

En 1992 mi sukcesis membriĝi en UEA. Tiam mi komprenis ke la Esperanto-aktivularo en Irano fakte limiĝas al kelkdeko da personoj kaj ke multaj esperantistoj neniam havis eblon sufiĉe informiĝi pri la tutmonda Esperanto-movado.

Mi skribis leteron pri mia vidpunkto kaj miaj movadaj celoj al konatoj kaj al homoj kies adresojn mi jam havis. Post kelkaj tagoj venis reagoj al mia invito. Samtempe mi komencis korespondi kun TEJO kaj ĉefe kun Sabira Ståhlberg, la tiama TEJO-vicprezidantino, pri landa agado. Sabira ege helpis min kaj donis tre utilajn konsiliojn. Tio gvidis al la kreiĝo de IREJO.

### *IREJO ŝajnas la ĉefa ag-forto en Irano. Ĉu juneco estas ĝenerala karakterizo de la irana movado?*

Ni memoru ke la nuntempa irana loĝantaro estas statistike unu el la plej junaj tutmonde, do ne estas strange ke ankaŭ la esperantistoj de Irano junas. La Esperanto-kursoj plenplenas de gejunuloj, kiuj konsistigas ankaŭ nian aktivularon.

### *Ĉu tamen la diversgeneraciaj aktivuloj bone kunlaboras?*

Feliĉe ni ne spertas intergeneracian problemon en nia movado. Hodiaŭ en nia Irana Esperanto-Centro, fondita en oktobro 1997, ni senprobleme kunlaboras kun gesamideanoj pli aĝaj ol 70 jarojn. Pli ol 40% de nia membraro en la Esperanto-centro superas la aĝon de 30 jaroj, kaj tio pravas ke ne ekzistas generacia problemoj en Irano. Ni ja havis problemon kun aktivuloj kiuj agadis kaj servis al

la Esperanto-movado sincere sed konservative. Kun ili ne estis facile komenci kunlaboron, kion mi ege bedaŭras. Tamen, ni sukcesis kunigi la disajn unuopajn esperantistojn, kaj en nia rondo ni pli kaj pli renkontas novajn vizaĝojn. Oni en Irano ege malfacile fidis al sociaj movadoj, sed 5 jarojn post la ekfunkcio de nia novspeca E-asocio oni kredas nin, kaj nia demokratiema kaj malferma komunumo allogas ĉiujn entuziasmojn.

## Granda movado sen asocio

Post modesta ekburĝonado en la tiama Persujo ĉirkaŭ 1910, Esperanto-movado apenaŭ ekestis en Irano antaŭ la mezo de la 70-aj jaroj. Tiam ĝin ekvivigis d-ro M.H. Saheb-Zamani, psikologo kaj sociologo, kiu instruis Esperanton al miloj da studentoj en la Universitato de Teherano, vastege artikolis kaj prelegis. (Pro tiuj meritoj li iĝis Honora Membro de UEA en 1983.)

En la fino de la jaroj 70-aj, Irano ŝajnis havi la plej dinamisme evoluantan E-movadotutmonde.

Tamen, post la islama revolucio de 1979 — kvankam en 1980 ankorau 675 mezlernejaj instruistoj lernis E-on en superintensa kurso dank'



Lernantoj de unu el la plej fruaj E-kursoj en la lando (Tabriz, 1912).

Komplezo de Mejlana Amir-Khah

iuigradan stagnon en la movado. D-ro Saheb-Zamani ja daŭrigis sian agadon: ekz. la nuna irana ministro pri ekonomio, d-ro Hosejn Namazi,

allaagemode d-ro Saheb-Zamani, kaj kun ministeria subteno — la sinteno de la aŭtoritatoj al E-o ne ĉiam estis klara, kio kaŭzis

partoprenis en 1992 lian bazan E-kurson en Behešti-Universitato.

116 UEA-membroj en Irano prezentas la plej grandan landan movadon sen landa asocio aliĝinta al UEA. En oktobro 1997 fondiĝis Irana E-Centro (direktoro: M. Reza Torabi), kiu funkcias kiel sidejo de Irana E-ista Junulara Organizo kaj de la prepar-komitato de Irana E-Asocio. Adreso: P.O.K. 17765-184, Teheran; ☎+98/21/850-529, ✉/✉876-42-50; ✉IREJO@neda.net.

# Intervjuo kun M. Reza Torabi

# Unueco


IREJO-ekskurso en provinco Khorasan, en decembro 1997

# kreos vivo

Fotoj: Komplezo de IREJO



**Nia movado havas varian historion en Irano. Ĝian nuntempan ĉapitron skribas ankaŭ ĝejunuloj kiel M. Reza Torabi, aktivulo de Irana Esperantista Junulara Organizo (IREJO) kaj TEJO-vicprezidanto por la mandato 1997-99. Ni intervjuis lin dum lia printempa, trisemajna gastado en Nederlando.**



M. Reza Torabi

# glon en Irano

*Ĉu la ĝenerala publiko en Irano scias pri Esperanto? Kiel oni rilatas al ĝi? Kiajn informadajn, varbajn sukcesojn vi atingis?*

Dum la periodo 1976-82 Esperanto estis vaste propagandata tra Irano, kaj la publiko estis grandioze bombardata per informoj, sed ne ekzistis organizita Esperanto-movado. Rerigardante hodiaŭ al tiu "ora periodo", ni ne povas lasi la aferon tute sen kritiko. Oni tiam faris troigojn pri Esperanto, tiel ke la publiko preskaŭ emis kredi ke baldaŭ la tuta mondo akceptos Esperanton! Post la revolucio tio kaŭzis reagojn de la instancoj: kelkaj kontraŭstaris Esperanton kaj ankaŭ esperantistojn kies agoj ne plaĉis al ili. En tiu etoso, homoj kiuj pro la antaŭa grandioza propagando eklernis Esperanton, restis sen pluaj informoj pri la Esperanto-movado kaj sen gvido por aliĝi al ĝi.

Ekde kiam mi ekis movadumi, mi ĉiam strebis al sobra informado. Kune kun miaj gesamideanoj mi klopodis kolekti aktualajn informojn pri la stato de Esperanto en la tuta mondo. Niaj informiloj priskribas la aplikadon de Esperanto, ĝian kapablon de interkomprengo kaj interamikeco, la diverskulturecon kaj neŭtralecon je kiu plenplenas Esperanto.

Unu el niaj ĉefaj agadoj tiurilate estas ĉeesti en kulturcentroj kie oni ofertas variajn kulturservojn al ĝejunuloj, kiuj amase partoprenas. Pri tia agado ni jam vere specialiĝis.

Ankaŭ en universitatoj niaj membroj varbadas laŭ siaj ebloj, disdonante informilojn en la plej taŭgaj manieroj. Ni havas la sperton ke rekta varbado en nia lando neniam profunde efikas, sed malrekta varbado ja atingas rezulton, do ni aranĝas i.a. ekskursojn en kiuj povas partopreni ankaŭ ne-esperantistoj: pli ol 80% de ili ekinteresiĝis pri Esperanto kaj eĉ partoprenas en niaj Esperanto-kursoj.

En la lastaj du jaroj ni mendas anoncojn pri Esperanto en junularaj revuoj, por reklami nian korespondan Esperanto-kurson. Ĉiusemajne dekojn da leteroj ni ricevas el diversaj urboj kaj vilaĝoj, kaj al ĉiuj ni sendas informilojn.

En unu el la plej popularaj retserviloj ni starigis Esperanto-rondon: do, ankaŭ per komputilo ni disdonas informojn kaj novaĵojn pri Esperanto. Mi esperas ke ni baldaŭ inaŭguros ankaŭ TTT-paĝon.

*Kiaj estas la organizaj kadroj en kiuj Esperanto povas funkcii en Irano?*

Ni ankoraŭ ne estas tre societemaj; unuopemeco regas nin en Irano. Mi ne havas dubon ke inter niaj gesamideanoj troviĝas tre kapablaj, influhavaj kaj talentaj personoj, kiuj povas multon fari, sed ankoraŭ ni ne estas kunligitaj. Ekzistas multaj signoj rilate la akceptadon de Esperanto kiel stud-objekto en kelkaj universitatoj, kaj se tio realiĝos, vere okazos Esperanto-revolucio en Irano!

En la kadro de la ŝtataj kulturcentroj la respondeculoj akceptas Esperanto-kursojn, se e-istoj mem aranĝas kaj prizorgas ilin. En la gazetaro fojfoje aperas Esperanto-rilataj novaĵoj, kaj e-istoj mem tradukas el Esperanto al la persa. Tiaj aferoj multe helpas la movadon kaj plifortigas la publikan atenton pri Esperanto.

*Ĉu ekzistas iaj malhelpoj al internaci-skala agado?*

Ne malmultas bariloj kaj malhelpoj! Estas fakto ke okcident-eŭropaj ŝtatoj pli kaj pli fermiĝas por alilandanoj. Pro tio pasintjare mi ne sukcesis ĝustatempe akiri nederlandan vizon por ĉeesti kunsidon de la TEJO-estraro. Por irananoj ĉiam estas tre malfacile akiri vizon por vojaĝi al Esperanto-kongresoj kaj -seminarioj en Okcidenta Eŭropo.

*Kion vi vidas kiel plej gravajn taskojn en Irano?*

Por havi viglan movadon ni devas plej labori pri informado. Se interesatoj povas akiri aktualajn informojn, ili povas iĝi aktivuloj por nia movado. Eldono de libroj pri la movado en la nacia lingvo multe helpas nin.

En la movado de nia lando ni bezonas plurismon, sed ne anarkion. Nur unuece ni sukcesos servi la movadon: nia baza tasko estas do krei etoson de unueco kaj amikeco ĉe la irana esperantistaro. Ni ne rajtas fermi la pordon al tiuj kiuj ne pensas kiel ni sed havas celon komunan kun ni. Estas nia tasko respekti niajn antaŭulojn kaj klopodi kunlabori kun ĉiuj, spite al personaj opini-diferencoj. ★



# De Kordileroj al karnavalo

**Okaze de profesia vojaĝo al Sud-Ameriko en majo, estrarano Amri Wandel preleg-vizitis Esperanto-grupojn en Argentino, Brazilo kaj Ĉilio.**

**S**pertaj movadaj aktivuloj, ĉefe en Eŭropo, ofte estas skeptikaj kaj cinikaj pri “verdaj” konceptoj kiel “fina venko” kaj “interna ideo”. En Sud-Ameriko mi trovis nemakulitan, sinceran entuziasmon pri la lingvo internacia: bela, eĉ kortuŝa sperto.

## Bariloche: Ĉu baldaŭ Greziljono?

Profunda impresio reciproka restis post mia vizito ĉe la aktiva E-grupeto en San Carlos de Bariloche, meze de sud-argentina feria regiono simila al Svislando. La membroj de Bariloĉea E-Rondo (BERo) ne estas multaj, sed ja fervoraj. La du motoroj de BERo, Delia Rebagliati kaj Werner Schad, energie kaj ĉarme informas pri Esperanto. Ili aranĝis por mi en la loka universitato prelegon pri Esperanto, kun interpreto en la hispanan. Sciigoj aperis en la lokaj televido, radio kaj tagaj gazetoj. Ĉeestis dudeko — i.a. la antaŭa dekanato kaj alia profesoro, kiuj vigle kundiskutis post la prelego.

Tiam leviĝis la demando kial Esperanto malpli sukcesas en Bariloche kaj fakte ĉie en Sud-Ameriko (krom Brazilo) ol en Eŭropo. Verŝajne pro la izoleco kaj la malfacileco vojaĝi — oni konkludis. Eĉ partopreni tutlandan renkontiĝon kostas mezan monatan salajron. Tamen, el la fervora BERo kreskis Alejandro Cossavella, kiu kante impresis la ĉeestantojn de la Malferma Tago (vd. jun., p. 104). Ĝuste junaj informantoj kiel li povus progresigi la

movadon, allogante gejunulojn. La Universitato en Bariloche ja pretas al okazigo de E-kurso, sed studentoj mankas.

Post la prelego ni vespermanĝis en la hoteleto Los Notros, kie BERo renkontiĝas ĉiun duan semajnon. La hotelo — posedata de grupano, kun belega panoramo sur la lago kaj kun hejmeca varmo — povus fariĝi Esperanta pilgrimejo por la tuta regiono, eĉ la tuta lando, kiel Kastelo Grésillon en Francio. La ejo kaj la Esperanto-kerno jam ekzistas, mankas e-istaj gastoj — kaj tion ni ĉiuj povas ŝanĝi. Ĉu postkongresa ekskurso de venonta sud-amerika UK gastos en Bariloche?

## Vekiĝonta E-vulkano en Ĉilio

Tra belegaj pejzaĝoj de la montaro Kordileroj, kun lagoj kaj dormantaj vulkanoj neĝkronitaj, sephora aŭto-vojaĝo apartigas de Bariloche la ĉilian havenurbon Puerto Montt, kie loĝas aktiva esperantisto. Dek horojn for de Bariloche troviĝas Temuco, alia ĉilia urbo kun aktivulo. Ĉu la tri urboj povus kune krei regionan, interŝtatan grupon?

Ankaŭ la ĉilia movado frontas la problemojn de distancoj kaj de maltaj salajroj. En la ĉefurbo Santiago mi renkontiĝis, en la hejmo de la vigla Jorge Tachauer, kun la “kerno de la

ĉilia movado” (kiel ili difinis sin), kvar veteranoj: preskaŭ duono de la aktiva esperantistaro ĉilia. Ili jam de pluraj jaroj ne kunvenis, kaj tutlanda renkontiĝo lastfoje okazis antaŭ pli ol dek jaroj. Mankas ejo kaj regulaj kunvenoj, sed ne mankas talento informi pri Esperanto kaj instrui ĝin. Post mia sugesto ekagi en Santiago simile kiel en Bariloche, ili reagis entuziasme, kaj ni eĉ faris planon: komenci per informado, venontjare provi lanĉi kurson en la universitato, kie influhava profesoro simpatias kaj eĉ mem scipovas Esperanton. Mi taksas ke la nun revekiĝanta loka entuziasmo, kun taŭga subteno de ILEI kaj UEA, povos naski E-kurson kaj novajn junajn aktivulojn. Gejunulojn eblos varbi ankaŭ ĉe E-

## La movada kerno en Santiago, Ĉilio

**De maldekstre: Amri Wandel levas glason kun Werner Schad kaj alia loka esperantisto (Bariloche, Argentino).**



budo en la Monda Skolta Ĵamboreo, kiu okazos apud Santiago jarfine (27 dec.-6 jan., vd. “Kalendaro”, p. 130). Dume bonvenas ĉiaj E-materialoj al la adreso de Jorge Tachauer: Av. Montenegro 1572, Santiago 11, Ĉilio.

## Kontaktoj tro malfortaj

Kontraste al la argentina kaj ĉilia E-movadoj, la brazila aspektas forta kaj vigla. Kelkajn tagojn antaŭ mia vizito okazis en Rio-de-Janeiro granda regiona renkontiĝo kun ĉ. 100 partoprenantoj. Tamen, la problemoj similas: malfacilo vojaĝi, nesufiĉaj kontaktoj kun la monda E-movado.

Asocio E-ista de Rio-de-Janeiro havas konstantan oficejon en la urbo-centro, kie mi prelegis antaŭ dudeko da esperantistoj. En la posta diskuto pri “Kiel UEA povas helpi?” multaj diris ke ili sentas la mondan movadon tro fora kaj la kontaktojn tro malfortaj kaj malfortaj. Ili ŝatus ke oni pli facile povu veturi al UK: ĉu per subteno al



# La lando kie mirakloj okazas

**Ĉu ie, en alia lando ol Brazilo, esperantista institucio estis financata de la brita registaro? Gvidanto de la bieno-lernejo Bona Espero, Giuseppe Grattapaglia, rakontas kiel tio okazis.**



**E**n aprilo oni inaŭguris en Alto Paraíso (Goiás) la urban sidejon de Bona Espero, kun la ĉeesto de pli ol 200 invititoj.

Kial urba sidejo por institucio kiu, de kvardek jaroj, plenumas socian laboron por infanoj de la kamparo?

Ĉar ĝuste en la daŭro de tiuj kvardek jaroj ni konstatis la neceson daŭrigi la edukadon de tiuj infanoj en la delikata adoleska fazo, kiam ili devas frekventi mezgradan lernejon en la urbo kaj bezonas apogon kaj loĝejon.

Por konstrui tiun domon, kies areo ampleksas pli ol 500 m<sup>2</sup>, ne sufiĉis nur bona volo, sed necesis financaj rimedoj.

Unue la tereno, ĉ. 3 000 m<sup>2</sup>, donacita de la urbestro de Alto Paraíso, rande de avenuo en la konstruata kvartalo “Nova Horizonte”.

Tuj ni atentigis la urbestaron ke, se la avenuo kondukas al nova horizonto, ĝi nepre devas nomiĝi “Esperanto”, kaj la propono estis akceptita por la urba dekreto n-ro 470/95.

Due, ni komencis konstrui la fundamenton, kolektante tridek kamionojn da ŝtonoj, ĉar sen firma fundamento ne ekzistas estonteco por Esperanto-iniciato!

Tria etapo, kampanjo inter esperantistaj geamikoj, garantiis la rimedojn por aĉeti la tegmenton, ĉar sen tegmenta organizo estus ĥaoso.

Fine, “nur” mankis la ceteraĵoj, kaj por ilin akiri necesis imago-povo.

Bona Espero situas “periferie” (laŭ brazilaj distancoj) de la ĉefurbo Brasília, kie pli ol cent ambasadoj de la tuta mondo disponigas trankvilan etoson en sub-tropika klimato al siaj

## Profesiaj vizitantoj

Ne eblas ignori ke malgraŭ ĉiaj klopodoj nia movado restas Eŭrop-centra, ekster Eŭropo plejparte malforta. Por pli oftaj kontaktoj inter la diversaj partoj de la monda E-movado necesas pli da esperantistaj vizitoj: ili kuraĝigas kaj helpas. Memoru tion kiam viaj vojaĝoj, turismaj aŭ aferaj,

feliĉaj funkciuloj. Kelkaj el tiuj ambasadoj subtenas evolu-helpajn iniciatojn. Kial do ne prezenti tie nian projekton?

Kaj jen la miraklo! Sekve de nia peto, la germanaj diplomatoj pagis cementon, feron kaj brikojn. La aŭstralia ambasadoro, dum persona vizito, pagis 30 pordojn kaj 30 fenestrojn, rememorante la tempon kiam li estis juna ataŝeo en Bruselo kun ambasadoro Ralph Harry. Li ne nur montris grandan aprecon por la laboro de Bona Espero, sed fariĝis nia “ambasadoro” ĉe sia brita kolego, rekomendante al li nian projekton.

Kaj estis ĝuste la brita ambasado kiu donacis la necesajn rimedojn por fin-

konstrui la domon kaj tiel misfamigi la onidiron ke la brita registaro ne subtenas Esperanton!

En tiu konstruado kunlaboris laŭvice esperantistaj volontuloj el Brazilo, Pollando, Danio, Urugvajo, Italio, Germanio, Rusio kaj Usono. Ne temis tamen pri Babela Turo ... danke al Esperanto!

Dum la inaŭgura ceremonio la reprezentanto de la brita ambasado brile intervenis per sia ses-monata portugala lingvo, kaj per tio li klare evidentigis ke la lingva problemo ne estas fantaziaĵo.

Tiu domo ne nur estas hejmo por la adoleskantoj de Bona Espero, sed ĝi jam fariĝis fokuso por novaj kulturaj iniciatoj en Alto Paraíso, sub la signo de Esperanto.

*Giuseppe Grattapaglia (Brazilo)*

lokaj aktivuloj por partopreni ĝin, ĉu pro pli oftaj mondkongresoj en Sud-Ameriko. Ĉi tio faciligus la alveturon ankaŭ de alilandaj esperantistoj sud-amerikaj, kies urboj povus krome allogi ekskursojn antaŭ aŭ post la kongreso. UK en Sud-Ameriko (supozeble en Brazilo) povus esti karnavalo por la E-movado en tuta kontinento.

atingas tiujn regionojn. Sed eĉ pli utile efikus sendo de “profesiaj vizitantoj”: de viglaj, kapablaj, vojaĝemaj gejunuloj, pretaj viziti izolitajn E-grupojn kaj laŭnecese resti tie iom da tempo, iniciati informkampanjon, entuziasmigi, helpi la lokan agadon, profesie informi pri Esperanto kaj instrui ĝin.

*Amri Wandel*



## Pli firma pozicio de UEA ĉe UN

La aktivado de UEA pri eksteraj rilatoj ricevis gravan rekonon kiam la Komitato pri Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) de la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK) de Unuiĝintaj Nacioj asignis al UEA la statuson de specialaj konsultaj rilatoj kun UN.

**S**ame kiel Unesko, ankaŭ UN re-konsideris siajn rilatojn kun NRO-j por pliefikigi ilin. Oficiala statuso ĉe UN donas al NRO-j prestiĝon, sed tio ne estas la motivo por UN. Laŭ la koncerna regularo UN postulas de siaj NRO-partneroj ke ili “apogu la agadon de UN kaj disvastigu la konon de ĝiaj principoj kaj aktivaĵoj”.

UEA havis konsultajn rilatojn kun UN ekde 1985, sed en 1997 ĝia statuso estis ŝanĝita al t.n. “listigita NRO”. En tiu kategorio troviĝas NRO-j kiuj povas fari al UN nur “okazajn utilajn kontribuojn”. Kvantkam tiel estis klasitaj ankaŭ aliaj gravaj organizaĵoj, ekz. PEN Internacia, tio ne reflektas adekvate la fakton ke UN-temoj estas por UEA ne nur okaza okupo sed konstanta engaĝiĝo. Freŝa ekzemplo estas la aprila homrajta simpozio en Ĝenevo (vd. jun., p. 102). Sekve UEA pretigis ampleksan dokumentaron pri sia agado por la Komisiono pri NRO-j, por pravigi promocion al pli taŭga rango. Ĉeestante ĝian kunsidon la 26-an de junio, estrarano Mark Fettes kaj UN-representantino Rochelle Grossman ĝojis atesti senprobleman akcepton de tiu peto.

Ekzistas du specoj de konsultaj rilatoj. Por NRO-j kiuj okupiĝas pri plej

multaj el la aktivaĵoj de UN estas ĝeneralaj konsultaj rilatoj. Specialan konsultan statuson povas atingi NRO — kiel UEA — kies agadtereno rilatas al parto de la UN-aktivaĵoj.

Dank’ al sia statuso, UEA rajtas ĉeesti kunsidojn de diversaj UN-organoj kaj en multaj kazoj interveni en diskutoj kaj fari proponojn. Kiel antaŭe, ĝi plu membras en CONGO

(Konferenco de NRO-j, nun 50-jariĝanta oficiala komuna organo de NRO-j kun konsulta statuso) kaj rajtas elekti en ties gvidorganojn. Samtage kiam Fettes kaj Grossman sekvis en Novjorko la traktadon de la promocieto de UEA, en Ĝenevo Andy Künzli, tiea UEA-representanto ĉe UN, ĉeestis kunsidon de la CONGO-estraro.


Osmo Buller



Foto: Unuiĝintaj Nacioj



## TUTMONDECA RIGARDO



**Analizo pri la rilato inter kulturo kaj teknologio.** Kiel efikas kulturo sur teknologiajn evoluojn? Ĉu kultura evoluo stimulas teknologiajn ŝanĝojn? Ĉu teknologio estas kulture neŭtrala? Kiaj teknologiaj taŭgas por evoluadoj? Post ĝenerala studo de tiu problemaro la aŭtoro traktas aparte la historiajn spertojn de Japanio, Germanio, Britio, Francio, Usono, Sovetio, Afriko kaj Ĉinio.

*“Helpas akiri pli tutmondecan rigardon al la rolo de kulturo en teknologia evoluo.”*  
(Ulrich Lins)

**KULTURO KAJ TEKNOLOGIO.** Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1997. 64p. ISBN 92 9017 053 0. 21 cm. Prezo: 15,00 gld.

## “Ne” al radikala propono

En 1996 Transnacia Radikala Partio (TRP) proponis al la EKOSOK-Komitato pri Neregistaraj Organizaĵoj havantaj oficialajn rilatojn kun UN ke la Komitato siavice proponu al la ĝenerala sekretario de UN enmeton de la demando de internacia helplingvo en la tagordon de EKOSOK.

TRP celis ke ĝia propono estu traktita de la Komitato en ties kunsido en majo 1997. Prepare, la prezidanto de UEA, prof. LEE Chong-Yeong, kaj aliaj UEA-representantoj — tiam en Novjorko lige kun la fondo de Koalicio por Internacia Helplingvo — asistis per lobiado la strebojn de TRP gajni subtenon (vd. jun. ’97, p. 101). Pro tempomanko la Komitato tamen ne povis trakti la proponon kaj prokrastis ĝin unu jaron. La propono de TRP estis fine traktita la 29-an de majo ĉi-jare kaj post 20-minuta debato malakceptita.



# TEJO — ĉu por lingvaj rajtoj?

**“Ni estas movado por lingvaj rajtoj” (Manifesto de Prago). Ĉu tio validas pri TEJO? — demandas sin Anna Ritamäki, ano de ties Komisiono pri Eksteraj Rilatoj, prepare al ĉi-tema TEJO-seminario.**

**E**kzistas almenaŭ unu lingvo kiun ni volas defendi, nian propran kaj komunan: Esperanton. Sed kiom pli ni volas fari por lingvaj rajtoj, kaj kiel? Kion alstrebu nia lingva politiko kaj kiel ni realigu ĝin? Kian rolon havas la Esperanta junularo? Kaj kiel agu TEJO, ties organizaĵo?

Tiuj ĉi demandoj estas la ĉefaj instigiloj de TEJO baldaŭ okazigi seminarion kun la temo “Lingvaj rajtoj — lingvopolitiko”, en Budapeŝto, en la Eŭropa Junulara Centro (11-18 okt.).

TEJO aliĝis al la Manifesto de Prago per komitata decido dum la Internacia Junulara Kongreso pasintajare. “Ni estas movado por demokratia komunikado. Ni estas movado por transnacia edukado. Ni estas movado por la provizo de (...) reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por lingva diverseco. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.” La resumaj frazoj de la Praga Manifesto donas al ni bazan superrigardon pri la celoj de la lingvopolitiko kiun ni alstrebas. Tio estas nia startopunkto. Per pli da scio kaj konscio ni povos iri ian distancon en la ĝusta direkto. Dum la seminario prelegos eminentaj spertuloj pri lingvaj demandoj, i.a. Tove Skutnabb-Kangas kaj Claude Piron. Ni lernos, diskutos kaj espereble kreskigos nian

memfidon. Ni strebos vidi la rolon de TEJO kaj de la Esperanto-movado en la nuna mondo kaj fari paŝojn por fortigi tiun rolon.

## Videbla pozicio

En niaj eksteraj rilatoj ni iom post iom sukcesis akiri videblan pozicion. TEJO estas konata aganto en la rondoj de la Eŭropa Junulara Forumo — kunliganta junularajn organizaĵojn en Eŭropo — kaj en la junularaj strukturoj de Konsilio de Eŭropo. En mondaj kunlaboraj forumoj ni estas videblaj. Ni reprezentas lingvajn rajtojn. Tio donas al ni legitimecon, sed al ni mem ankoraŭ ne estas klare kiel ni realigu la eblojn de tiu nia misio. Temas pri ebloj por TEJO kiel organizaĵo: rekono, influo, kredindeco, kontaktoj, fontoj de subvencioj. Temas ankaŭ pri ebloj por la lingvaj rajtoj: ĉu vere ni havas povon influ, kontribui al pli bona lingva ordo?

TEJO strebas, kunlabore kun aliaj junularaj organizaĵoj, okazigi simpozion pri lingvaj demandoj. La seminario en oktobro estos grava paŝo ankaŭ rilate al tiuj planoj.

Konsilio de Eŭropo repagas la vojaĝkostojn al la seminario. La partoprenkotizo estas 250 francaj frankoj. Partoprenos entute 35 individuaj membroj de TEJO, precipe el Eŭropo,

## Nova KER-manlibro

Post la lasta, profunda revizio de la TEJO-manlibro por la anoj de ĝia Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) nun eblos paroli pri entute nova KER-manlibro.

La celo de la konsilaro estas duobla: orienti la TEJO-reprezentantojn en ties ambasadoraj taskoj tra la “krokodila mondo” kaj doni superrigardon pri subvenciaj ebloj ĉe eŭropaj instancoj. Kompletigas ĝin kvinlingva terminaro por tradukistoj kaj “Eŭropa ABC” de Konsilio de Eŭropo, pri Eŭropo kaj eŭropaj junularaj strukturoj.

Multaj informoj en tia libro ofte malaktualiĝas. Tial TEJO nun eldonos ĝin en formo de aktuĵo kun apartaj folioj ŝanĝeblaj. La manlibro ne celas vastan publikon; TEJO nur disponigas ĝin senkoste al siaj KER-aktivuloj.

Se vi konsideras grava tiun laboron de TEJO kaj emas ĝin subteni, sendu vian donacon al TEJO indikante “por la KER-manlibro”.

*Miquel Gómez i Besòs  
Vicprezidanto de TEJO*

sed verŝajne ankaŭ el aliaj mondo-partoj. Aliĝoj alvenu al Lariko Golden (Damjanich u. 1/c. I. 8., HU-8200 Veszprém, Hungario; ☎+36/88/424-339; ✉+36/1/282-88-85; ✉golden@osiris.elte.hu) antaŭ la fino de aŭgusto. Same spertuloj kiel nespertuloj pri la temo kaj pri TEJO-agado estas kore bonvenaj aliĝi.

*Anna Ritamäki (Finnlando)*

## TEJO SERĈAS VOLONTULON

por labori en la Centra Oficejo dum periodo de ĉ. unu jaro, ekde septembro 1998. La TEJO-volontulo

- havu tre bonan lingvonivelon en Esperanto kaj scipovu la anglan kaj/aŭ la francan (scio de pliaj lingvoj estas avantaĝo);
- spertu pri komputiloj, prefere Makintoŝo;
- profunde konu la junularan E-movadon;
- estu kapabla memstare decidi kaj preta kunlabori kun la TEJO-estraro en la ĝenerala funkciigado de la organizo;
- havu konon pri la eŭropaj junularaj strukturoj kaj eŭropaj instancoj.

La laboro konsistas el: pritrakto de la poŝtaĵoj; prizorgo de la TEJO-arkivo; administro kaj prizorgo de kontaktoj kun diversaj eŭropaj kaj aliaj organizoj; aktiva subteno al la agado de la estraranoj kaj komisiitoj de TEJO; kunlaboro en la verkado de subvencipetoj kaj en la aktualigo de la TEJO-retpaĝoj.

La volontulo ricevas senkoston ĉambron en la CO kaj poŝmonon konvenan por sin vivteni. Kandidatoj sendu al la CO, prefere antaŭ la 15-a de aŭgusto, vivpriskribon, leteron pri motivoj, laŭeble ankaŭ pruvilojn de la supre postulataj kapabloj kaj rekomendleteron de — ekzemple — nacia E-organizo.





# Kalendaro 1998-99

Ĉi-sube sekvas daŭrigo kaj kompletigo de la aranĝo-listo aperinta en marto (p. 51-54). Informoj pri eventoj tie anoncitaj estas nur parte ripetataj. La venonta "Kalendaro" aperos en novembro.

## JULIO

- 24-27: 17-a Komuna Seminario de gejunuloj, Pekino, Ĉinio (Ĉina Junulara E-Asocio, P.O. Kesto 825, CN-100037 Beijing; ☎+86/10/68-32-66-82; ✉68-32-18-08; temo: "Esperanto kaj mi")
- 25-01 aŭg.: 54-a Internacia Junulara Kongreso, Rijeka, Kroatio (Ivica Ivaci, KEJA, Amruševa 5, HR-10000 Zagreb; ☎+385/1/481-01-52; ✉iivaci@jagor.srce.hr, <http://pubwww.srce.hr/keja/ijk.htm>; temo: "Amaskomunikiloj — kreantoj de amaskulturo")

**54-a Internacia Junulara Kongreso**  
25 jul.-01 aŭg.,  
Rijeka, Kroatio



- 25-01 aŭg.: 13-a Ekumena E-Kongreso de KELI kaj IKUE, Nantes, Francio (Philippe Cousson, 26 rue de Pré Venet, FR-86340 Nouaillé-Maupertuis; ☎33/549-46-80-21; ✉diaregno@altern.com, <http://filipo.citeweb.net/>; temo: "Toleremo, repaciĝo, libereco: 1598-1998")

## AŬGUSTO

- 01-08: 83-a Universala Kongreso de Esperanto; FESTO, junulara programo de la UK; 31-a Internacia Infana Kongreso, Montpellier, Francio (CO de UEA, adreso kolofone; temo: "Mediteraneo — ponto inter kulturoj")
- 02-15: Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥio (Esperanto, CZ-67401 Třebíč; ☎+420/618/21-909)
- 07-10: Antaŭfestivalo de la 6-a Kultura E-Festivalo, Stokholmo, Svedio (vd. 10-16 aŭg.)
- 08-11: Seminario pri verda politiko '98, La Couventoirade, Larzac, Francio (Sion, Ch. des Fontinettes, FR-59552 Lambres-lez-Douai; ✉+33/3/27-97-87-87; ✉mpcion@nordnet.fr, <http://www.comlink.apc.org/ave/seminar.htm>)
- 08-14: 32-a Konferenco de ILEI kaj ILEI-Gimnazio por 12-16-jaruloj, Montpellier, Francio (Bertil Andréasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby, Svedio; temo: "Lingvoinstruado, ponto al la mondo")
- 08-15: Konferenco de Internacia Komunista E-ista Kolektivo, Durban-Corbières, Francio (Vilhelmo Luterano, Fono Gazela, FR-11360 Embres-et-Castelmaure; ☎+33/4/68-45-81-32; ✉100070.2001@compuserve.com)
- 09-10: 1-a Forumo por la Esperanta civito, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE\*)
- 09-11: Praktikado de la lingvo, Bouresse, Francio (Kvinpetalo\*; Paulio Gubbins)
- 09-16: Junulara Ekumena E-Tendaro, Taizé, Francio (Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, DE-78050 Villingen, Germanio; ☎+49/7721/22-073; ✉22-074; ✉b.eichkorn@t-online.de)

- 10-16: 6-a Kultura E-Festivalo, Lesjöfors, Svedio (Janko Luin, Myggdalsv. 123, SE-13542 Tyresö; ✉janko@esperanto.se, <http://www.esperanto.se/kef/>)
- 10-17: 5-aj Someraj Kursoj, Istrio, Kroatio (Orbis Pictus\*; instruas Višnja Branković, Spomenka Štimec kaj Hans Michael Maitzen, prelegas Ivo Borovečki)
- 11-15: Omaĝe al Roger Bernard, Bouresse, Francio (Kvinpetalo\*)
- 12-18: 1-a Plurnivela Internacia Kursaro, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE\*; gvidas Claude Gacond, Giorgio Silfer, Ljubomir Trifončovski, Ágnes Verrasztó)
- 13-22: 4-a Internacia Arkeologia Laborbrigado, Blera, Italio (Pierluigi Cin-



quantini, via Dante Alighieri 2, IT-01010 Blera; ☎/✉+39/761/479-503; ✉pcinqua@tin.it, <http://www.newlog.it/esperanto/iej.htm/>)

- 14-23: Internacia Renkontiĝo de Interesaj Homoj, Bjaltostoko, Pollando (E-Centro Zamenhof, Piękna 3, PL-15-282 Białystok; ☎/✉+48/85/454-600; ✉f-zamenhof@centrumtur.sitech.pl)
- 15-21: 38-a Internacia Somerlernejo trnivela, kun ILEI/UEA-ekzameno element-nivela, Barlaston, Britio (Derek Tatton, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Britio ST12 9DG; ☎+44/1782/372-105; ✉372-393; ✉wedgwood.college@staffordshire.gov.uk; instruos/prelegos M. Boulton, T. Carr, R. Edwards, P. Gubbins, K. Hall kaj A. Melnikov)
- 17-27: OKSEJT-38 (junulara tendaro), Moskvo, Rusio (Grigorij Arosjev, RU-117071 Moskvo, ab. ja. 31; ☎+7/095/253-65-21; ✉oksejt-98@usa.net)
- 18-23: Virino en la Esperanta literaturo, Bieno Njeguš, Kroatio (Orbis Pictus\*; gvidas Spomenka Štimec)
- 19-25: 6-a Internacia Akademio Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, Pekino, Ĉinio (Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio, ĉe Ĉina Akademio de Sciencoj, 52 Sanlihe, CN-100864 Beijing; ✉+86/10/68-51-24-58; ✉lrf@lasgsg4.iap.ac.cn)
- 21-23: 3-a Simpozio pri rilathistorio inter Japanio kaj Koreio, Seulo, Koreio (Nisio Tutomu, Takadono 4-13-3, Asahi-ku, Oosaka-si, 535-0031 Japanio; ☎+81/6/958-25-03; ✉958-25-04; ✉nbg02407@niftyserve.or.jp; temo: "Post la azia pacifika milito")
- 22-26: 67-a Itala E-Kongreso, Frascati, Italio (C. Sarandrea, Via di Porta Fabbrica 15, IT-00165 Roma RM; ☎/✉+39/6/632-839; ✉c.sarandrea@agora.stm.it; temo: "Eŭropa mono — eŭropa lingvo")

## \*ADRESARO Jen la adresoj signitaj per asterisko tra la kalendaru rubriko. Ĉiuj aliaj adresoj troveblas post la koncernaj aranĝoj.

KCE (Kultura Centro Esperantista), CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio; ☎/✉ +41/32/926-74-07

Kříž: Josef Kříž, Družstevní 411/11, CZ-40007 Ústí nad Labem, Ĉeĥio


Kvinpetalo, Rue du Lavoir, FR-86410 Bouresse, Francio; ☎+33/5/49-42-80-74

Orbis Pictus, Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste, Italio; ☎/✉+39/40/767-875; ✉orbispictus@iol.it

**Interreto.** Daŭre aktualigata listo de ĉiuj konataj E-aranĝoj konsulteblas ĉe la TTT-paĝoj [www.hungary.net/esperanto/](http://www.hungary.net/esperanto/). Ĝi estas ankaŭ ricevebla per sendo de jena mesaĝo al ✉w3mail@gmd.de: "get ftp://ftp.hungary.net/pub/esperanto/kalendar.txt". En papera versio ĝi aperas po monataj blokoj en *Eventoj*.



- 23-28: 17-a Internacia Literatura Forumo, Swidnik, Pollando (Tomasz Chmielik, ul. Jarzebinowa 3/30, PL-21-040 Swidnik; ☎+48/81/468-16-25; ✉751-57-13; temo: "La juda kulturo kaj ĝia kontribuo al la Esperanta")
- 24-30: 90-jara jubileo de E-agado en Lodzo, Pollando (Lodza Filio de PEA, ul. Moniuszki 5, 90-101 Łódź, p.k. 337; ✉esperanto\_lodzo@ikki.com.pl, http://www.ikki.com.pl/esperant/)
- 24-30: 13-a KISO, Marburg, Germanio (Gunter Neue, Kaffweg 9b; DE-35039 Marburg; ☎+49/6421/27-889)
- 27-30: 3-a E-ista Renkontiĝo de Serba Respubliko, Prijedor, Serba Respubliko, Bosnio (E-Ligo de Serba Respubliko, Pk. 335, BA-78001 Banja Luka; ✉esperoel@etf-bl.rstel.net)
- 29-05 sept.: Internacia Semajno E-ista, Sète, Francio (Esperanto, 5 rue Docteur Roux, FR-34090 Montpellier; ☎+33/4/67-54-15-43)
- 31-03 sept.: 19-a Sanmarineca sesio de AIS, Rimini, Italio – San-Marino (Joanna Lewoc, Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, DE-37077 Göttingen, Germanio; ☎+49/551/376-072; ✉blewo1@hrz.uni-paderborn.de, http://www.forst.uni-muenchen.de/others/AIS/; temo: "Eŭropo kaj ĝia integriĝo sojle de la 21. jc.")
- 31 aŭg. - 19 dec.: Tutsemestra E-kurso, Karlskoga, Svedio (Karlskoga Popola Altlernejo, Esperanto-fako, Box 192, SE-69124 Karlskoga; ☎+46/586/64-600; ✉64-622)



**Tutsemestra Esperanto-kurso**  
31 aŭg.-19 dec., Karlskoga, Svedio

## SEPTEMBRO

- 04-06: Skota Studsemajnfino, Dunblane, Skotlando (Jean Bisset, 47 Airbles Crescent, Motherwell, ML1 3AP Britio)
- 04-06: 49-a Kongreso de Bulgara E-Asocio, Gorna Orjahovica, Bulgario (Esperantsko дружество "Espero", Gorna Orjahovica, ul. Vastaničeska 1)
- 04-06: 5-a Gastronomi Semajnfino (ĉokolado), Isques apud Bulonjo-sur-Mar, Francio (Pascal Lécaille, B.P. 3019, FR-69394 Lyon Cedex 03; ☎+33/4/72-36-07-14; ✉jefo@esperanto.org)
- 05-07: 20-a Renkontiĝo de E-o de ŝtato San-Paŭlo, Paulinia, Brazilo (KCE, C.P. 1097, BR-13001-970 Campinas – SP; ✉kultura@turing.unicamp.br)
- 12-13: Literatura Festivalo, Mantua, Italio (Esperanta PEN-Centro, CP 232, CH-6830 Chiasso 1, Svislando; prelegas William Auld, Ilona Koutny, Carlo Minnaja)

- 12-13: Regiona kultura semajnfino, Cully, Svisio (Nicole Margot, ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne; prelegas Claude Gacond)
- 13-20: Esperanto – Komerca Agado, kurso, elmontrado de varoj kaj prelegoj, Rijeka, Kroatio (Orbis Pictus\*)
- 15-20: Verkista ateliero, Tavoleto, Italio (LF-Koop, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; gvidas William Auld)



**3-a Hansa E-Tago**  
18-20 sep., Lásby, Danio

## ESPERANTO

- 18-20: 3-a Hansa E-Tago, Lásby, Danio (Esperanto-Kiel, Johannesstr. 54, DE-24143 Kiel, Germanio; ☎+49/431/737-788)
- 18-20: Surpriza Semajnfino, Bieno Njeguš, Kroatio (Orbis Pictus\*)
- 24-27: Montkabana Renkontiĝo, Bad Godesern, Aŭstrio (Aŭstria Esperanto-Junularo, Poŝtfako 804, AT-8011 Graz)
- 25-27: 14-aj Artaj Konfrontoj en E-o (AR-KONES), Poznań, Pollando (Paweł Janowczyk, ul. Zawady 2/7, PL-61-002 Poznań; ☎+48/602/352-664)
- 25-28: Internacia Amikeca Renkontiĝo, Aylesford, Britio (Anica Page, 37 Bullfinch Close, Riverhead, Sevenoaks, Kent TN13 2BB)
- 26-30: Seminario Esperanto 2000, Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo, M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando; ☎/✉+48/52/341-57-44; ✉turismo@bydg.pdi.net, http://www.bydg.pdi.net/~turismo/)
- 26-04 okt.: 24-a Internacia E-Forumo de Turismo kaj Kulturo, Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo, kiel ĉi-supre)
- 27-31: Japano semajno, Bouresse, Francio (Kvinpetalo\*; gvidas Kimie Markarian)
- 30-03 nov.: Praktikado de la lingvo, Bouresse, Francio (Kvinpetalo\*; gvidas Helga Rapley kaj Suzanne Bourot)

## OKTOBRO

- 02-04: Faulhaber-semajnfino, Elspeet, Nederlando (Kees Hoeijenbos, Narcisplantsoen 52, NL-2015 AK Haarlem; temo: "Akvo: amiko aŭ mal-amiko?")
- 02-04: Gastronomi semajnfino saŭkraŭta kaj kiŝa, Diebolsheim ĉe Strasburgo, Francio (Magali Texier, Hafenstr. 39/301, DE-68159 Mannheim, Germanio; ☎+49/621/106-862; ✉621/13-739; ✉magali@rumms.uni-mannheim.de)
- 02-04: 11-a Kultura Festivalo, Ústí nad Labem, Ĉeĥio (Kříž\*)
- 02-04: La papo vizitas Kroation, akompana programo en bieno Njeguš, Kroatio (Orbis Pictus\*)

- 03: Internacia Ago-Tago (vd. *Influo*, p. 134)
- 03-04: 85-a Japano E-kongreso, Kanazaŭa, Japanio (Japano E-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tōkyō-to 162; ☎+81/3/32-03-45-81; ☎/✉32-03-45-82; ✉jei@mre.biglobe.ne.jp)
- 03-10: 6-a Internacia E-Semajno, Calafell, Katalunio, Hispanio (HFEA, Apdo 15027, ES-08080 Barcelona; ☎+34/3/727-50-21; ✉jserrano@oc6.es)
- 04-10: Hungaria E-ista Semajno, div. regionoj (Espertur, Tátra u. 4, HU-1136 Budapest; ☎+36/1/268-03-06; ✉268-03-31; ✉esperantohea@mail.c3.hu)
- 08-11: Metodika Seminario, Bieno Njeguš, Kroatio (Orbis Pictus\*; gvidas Katalin Smidélus)
- 09-11: 30-a Korea Kongreso de E-o, Taejon, Koreio (Korea Esperanto-Asocio, 1601 Kangbyon Hanshin Core B/D, 350 Mapo-Dong, Mapo-gu, Seoul; ☎+82/2/717-69-74; ✉717-69-75; ✉keast@soback.kornet.nm.kr)
- 09-12: 52-a Argentina E-Kongreso, Pcia R. Sáenz Peña, Argentino (Saenzpenja E-Klubo, Calles 119 y 122, AR-3700 Pcia R. Sáenz Peña; ☎+54/732/20-660; ✉cefa@fai.unne.edu.ar ["por Tony Stacul"]; temo: "Kiel levi la profesinivelon de Esperanto")



- 10-11: 3-a Zmijiva E-Renkontiĝo, Ukrainio (Alina Ŝijaĥova, UA-313720 Zmijiv, Ĥarkivsĵka obl., Kalinina str. 11)
- 10-12: 5-a Internacia Semajnfino E-ista, Ludlow, Vermonto, Usono (ESK, 6358 rue de Bordeaux, Montréal QC, H2G 2R8; ☎/✉+1/514/272-01-51; ✉esperanto@sympatico.ca, http://www3.sympatico.ca/esperanto/)
- 11-18: TEJO-seminario pri "lingvaj rajtoj – lingvopolitiko", Budapeŝto, Hungario (Lariko Golden, Damjanich u. 1/c. I.8, HU-8200 Veszprém, Hungario; ☎+36/88/424-339; ✉+36/1/282-88-85; ✉golden@osiris.elte.hu; vd. artikolon sur p. 127)
- 11-20: Studotagoj de AIS, Freising, Germanio (Reinhard Fössmeier, Rahel-Straus-Weg 19, DE-81673 München; ☎+49/89/651-86)
- 14-21: Krozado tra Suda Nederlando (Jan A. Hanse, Rothenbachpark 44, 6063 NM Vlodrop; ☎+31/475/534-325)
- 22-23: Gastronomi antaŭ-semajnfino pana, Balagué, Francio (Christian Lavarenne, Le Presbytère, FR-09800 Balagué, Francio; ☎/✉+33/5/61-04-70-66)





- 23-25: 6-a Gastronomia Semajnfino, Gaillac-Toulouzou ĉe Tuluzo, Francio (Sylvie Roques, 8 rue Jean Soula, FR-31240 St. Jean, [sylvie.roques@wanadoo.fr](mailto:sylvie.roques@wanadoo.fr))
- 24: 110-jariĝo de la E-Grupo, Nürnberg, Germanio (Anny Hartwig, Pirckheimerstr. 11, DE- 90408 Nürnberg; [+49/911/359-658](tel:+49911359658))
- 25-01 nov.: 10-a E-Ĥor-staĝ', Lavelanet, Francio (Jorgos, 7, rue Espéranto, FR-09120 St-Félix-de-Rieutort; gvidas Zdravka Bojčeva)
- 29-01 nov.: Ruslanda E-Kongreso '98, Tomsk (RU-634055, Tomsk-55, a/k 2289; [gbasov@hcei.tomsk.su](mailto:gbasov@hcei.tomsk.su); temo: "Socia partnereco — determino de rolo kaj loko de E-organizaĵoj en Rusio")

## NOVEMBRO

- 07-08: 9-a kongreso de Ukrainia E-Asocio, Kievo, Ukrainio (Vladimir Hordijenko, p.k. 35, UA-252133 Kijiv-133; [+38/044/295-17-01](tel:+380442951701); [+295-28-70](tel:+3802952870); [lnp@un.kiev.ua](mailto:lnp@un.kiev.ua))
- 13-15: 10-a Sudbrazila E-Renkongito, Florianópolis, Brazilo (Fondaĵo Simpozio, Rua Conselheiro Mafra 176, BR-88000 Florianópolis — SC)
- 13-15: Kolokvo "Apliko de E-o en scienco kaj tekniko", Prago, Ĉeĥio (Kava-Pech, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice; [+420/2/991-22-01](tel:+42029912201); [+991-21-26](tel:+4209912126); [chrdle@telecom.cz](mailto:chrdle@telecom.cz); temoj: "Modernaj komunikrimedoj: avantaĝoj kaj problemoj", "Terminologiaj problemoj rilate aplikon de E-o en scienco kaj tekniko")
- 13-15: Bienalo de E-kulturo, Bratislava, Slovakio (Alica Komlóši, Rovníkova 6, SK-821 02 Bratislava; [+421/7/291-604](tel:+4217291604); [+327-731](tel:+421327731))
- 20-22: Kultura E-Festivalo, Santiago de Cuba, Kubo (Kuba E-Asocio, Apdo

5120, CU-10500 La Habana; [+53/7404-484](tel:+537404484) kaj 401-364; [+338-729](tel:+53338729); [kubesp@mail.infocom.etecs.cu](mailto:kubesp@mail.infocom.etecs.cu))

- 22-23: 15-a Kulturkunveno de E-o, Kameoka, Japanio (EPA, Oomoto, Ten'on-kyô, Kameoka-si, Kyoto-hu, 621-8686, [+81/771/225-561](tel:+81771225561); [+250-061](tel:+81250061); [100507.1652@compuserve.com](mailto:100507.1652@compuserve.com))
- 28-29: Speciala monاتفino pri KCE 30-jara, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE\*; kun D. Buhlmann kaj C. Gacondo)
- 28: Malferma Tago de la Centra Oficejo (por la adreso vd. la kolofonon)

**Malferma  
Tago de la  
CO**  
28 nov.,  
Rotterdam,  
Nederlando



## DECEMBRO

- 04-06: Sankt-Nikolaa Festo, Poprad, Slovakio (Esperanto — Regiona Societo, Sobotské námestie 36, SK-05801 Poprad; [+421/92/32-419](tel:+4219232419))
- 04-06: Kuriozaĵoj el la vivo de Zamenhof, Rijeka, Kroatio (Orbis Pictus\*, prelegas d-ro Heiner Eichner)
- 04-06: 52-a Kultura Semajnfino, Homburg, Germanio (Sarlanda E-Ligo, Pf. 1844, DE-66468 Zweibrücken; [+49/6332/981-190](tel:+496332981190); [+981-192](tel:+49981192); [sel@ur.pils.de](mailto:sel@ur.pils.de))
- 05: 13-a Ĉeĥa-Saksa Tago, Ústí nad Labem, Ĉeĥio (Kříž\*)
- 10-15: 1859...69...79...89: de Zamenhof al Privat tra Gandhi, Lanti, R. Roland, Bouresse, Francio (Kvinpetalo\*; gvidas Georges Lagrange)

- 27-03 jan.: 42-a Internacia Seminario, Kassel, Germanio (Norbert Piechotta, Rondellstr. 3, DE-85540 Haar; [+49/89/688-37-79](tel:+49896883779); [is.admin@esperanto.de](mailto:is.admin@esperanto.de); <http://www.esperanto.de/is/1998/>; temo: "Dependeco: faktoj, sekvoj, solvoj")
- 27-03 jan.: 15-a Internacia Festivalo por junaj familioj kaj personoj 25-55 jarojn aĝaj, Saarbrücken, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein; [+49/5624/8007](tel:+4956248007); [+5624/322](tel:+495624322); <http://www.quicknet.se/home/q-111060/intfest.htm>; temo: "Hobioj")
- 27-06 jan.: Monda Ĵamboreo, Ĉilio (Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, Séptima Región; [+56/75/310-382](tel:+5675310382); [qstrigo@entelchile.net](mailto:qstrigo@entelchile.net))
- 28-02 jan.: Sekretoj de ŝakludo (Nicola Palladino) kaj Lerni pri lignoarto (Tamás Szabó), La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE\*)
- 30-02 jan.: Budapeŝta silvestro, Hungario (Hungaria E-Asocio, Pf. 193, HU-1368 Budapest; [+36/1/268-03-06](tel:+3612680306); [+268-03-31](tel:+3612680331); [esperantohea@mail.c3.hu](mailto:esperantohea@mail.c3.hu))
- 30-02 jan.: Silvestra balo kaj ekskursoj, Poprad, Slovakio (vd. 04-06 dec.)
- 30-02 jan.: Transjara Kurskunveno, Kameoka, Japanio (Oomoto, vd. 22-23 nov.)
- 31-01 jan.: Novjara festo, montaro Karpatoj, Ukrainio (Jaroslav Zaharija, UA-284006 Ivano-Frankivskij, B. Hmelnickij str. 82/4 - 8; [+38/03422/62-241](tel:+380342262241))

## 1999

## JANUARO

- 10-23: 15-a Aŭstralia Somerkursaro de E-o, Melbourne, Aŭstralio (Jennifer Bishop, P.O.Box 2122 T, Melbourne 3001; [+61/3/98-18-73-58](tel:+61398187358); [+99-05-36-68](tel:+6199053668); [esperanto@education.monash.edu.au](mailto:esperanto@education.monash.edu.au); <http://www.edx1.educ.monash.edu.au/projects/Esperanto/esp-ver.html>)
- 22-25: Kongreso de Nov-Zelanda E-Asocio, Wellingtono, Nov-Zelando (David Ryan, P.O.B. 3867, NZ-6015 Wellington; [kiwimex@extra.co.nz](mailto:kiwimex@extra.co.nz))
- 27-03 feb.: 4-a Tutamerika Kongreso de E-o, Bogoto, Kolombio (Apdo Postal 54800, Bogotá; [erflores@openway.com.co](mailto:erflores@openway.com.co); temo: "Esperanto kaj la tria jarmilo")

## MARTO

- 05-09: EoLA-11, Internacia Festivalo de E-Arto, Kievo, Ukrainio (Grigorij Arosjev, RU-117071 Moskvo, ab. ja. 31; [+7/095/253-65-21](tel:+70952536521); [arosjev@esperanto.nu](mailto:arosjev@esperanto.nu))

## MAJO

- 08-15: 51-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio, Le Mans, Francio (Jean Ripoché, 6 rue des Platanes, La Gautrie, FR-72230 Arnage; [+33/2/43-21-16-39](tel:+33243211639); [Jean.Ripoché@wanadoo.fr](mailto:Jean.Ripoché@wanadoo.fr))

## JULIO

- 31-07 aŭg.: 84-a Universala Kongreso de Esperanto, Berlino, Germanio (CO de UEA, adreso en la kolofono; <http://www.geocities.com/SoHo/Studios/6120/esp.html>)

*Kontribue al Kampanjo 2000, Ĉeĥa Esperanto-Asocio invitas al*

## Kolokvo "Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko" KAEST '98

Prago, 13-15 novembro

*sub la aŭspicioj de UEA kaj Internacia Scienca Asocio Esperantista*



**Plenkunsido:** Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko (ĝenerale)  
**Sekcioj:** Modernaj rimedoj de komunikado: iliaj avantaĝoj kaj problemoj;  
 Terminologiaj problemoj de fakaj apliko de Esperanto  
**Organizoj:** KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice, Ĉeĥio; [+420/2/991-22-01](tel:+42029912201); [+991-21-26](tel:+4209912126); [chrdle@telecom.cz](mailto:chrdle@telecom.cz); <http://www.kuk.cz/cea/>

Aŭtoroj de kontribuoj estas petataj sendi siajn aliĝilojn kun titolo kaj maks. 50-vorta resumo laŭeble ĝis la 8-a de aŭgusto. Antaŭ la 31-a de aŭg. ili ricevos pliajn informojn.  
 Partoprenkotizoj varias de 30 ĝis 80 NLG. Honoraj membroj de UEA, ISAE kaj ĈEA rajtas aliĝi senpage, sed nur ĝis la 8-a de aŭgusto.



# Influo

Por plibonigi la fluon de informoj pri informado



Numero 17



**Abundis ĉi-foje materialo por la numero. Pardonu do tiuj por kies kontribuoj mankis spaco. Dankon**

**al tiuj kiuj, laŭ mia peto en Influo 16, sendis broŝurojn (ĉefe el Norvegio kaj Japanio).**

**Ĝenerale rekomendindas ke kontribuajtoj estu mallongaj kaj plenaj de informoj (ne de opinioj). Mi supozas ke ĉiuj legantoj de Influo konsentas pri la meritoj de E-o, do ne necesas ripeti ilin ĉi-loke. Tio kio utilas al ni estas interŝanĝi ideojn por plej efike atentigi la homojn pri nia lingvo.**

*Geoffrey Greatrex*

## Gazetaraj Komunikoj


En majo la Informa Fakto de la CO ĝojigis E-redaktorojn per nova servo: retroŝtataj Gazetaraj Komunikoj de UEA. Ili raportas koncize kaj fidele pri freŝaj agadoj kaj atingoj de UEA, decidoj de la asociaj organoj, novaj eldonaĵoj de UEA ktp. La komunikoj aperas principe la 5-an, 15-an kaj 25-an de ĉiu monato. Rete atingeblaj redaktoroj ankoraŭ ne en la sendolisto bv. sciigi sian deziron al la CO. Redaktoroj sen retadreso povas ricevi la tekstojn per ordinara poŝto.

Kvankam la temoj de la Komunikoj eĉ pli detale traktiĝas ĉi-revue, interesataj Membroj-Abonantoj, Dumvivaj kaj Honoraj Membroj kun retadreso povas ricevi ilin laŭ peto.

## 3-a IASI, pri intervjuoj

En la Pariza sidejo de Junulara E-ista Franca Organizo (JEFO) jam trian fojon okazis Interasocia Seminario pri Informado en la semajnfino de 27-28 junio. (Pri la 2-a IASI vd. *Influo* 16, marto, p. 47.)

kaj kune analizis niajn proprajn parolojn. Dum la posta diskuto, la ĵurnalistino opiniis ebla ke Esperanto-instruisto partoprenu elsendon pri Esperanto kaj ĝiaj lernantoj ĉe Radio France Internationale.



Foje ankaŭ la CO plenumas intervjuojn: skipo de la nederlanda monda televido filmas redaktoron I. Ertl.

Ĉeftemis intervjuoj por televido kaj radio. Estis invititaj ĉefe la partoprenintoj de la 2-a IASI; ĉeestis 8 JEFO-aktivuloj kaj 7 aliaj.

Sabaton matene ni plenigis demandaron kun pli ol 40 eroj pri Esperanto, la esperantistoj kaj la ne-esperantistoj. Ni laŭtleĝis kaj komentis la respondojn. Profesia psikologo pretigis por ni analizon pri ili. Ni jam povis konstati certan homogenecon de niaj respondoj.

Post tagmanĝo en apuda ĉina restoracio, ni rekomencis nian laboron per radio-intervjuo realigita de ĵurnalistino (ne-esperantisto) ĉe la kanalo France-Culture. Ni ĉiuj parolis unu post la alia

Dimanĉe la laboro daŭris per televida intervjuo fare de Agnieszka Moreau kaj Philippe Berizzi. Ili uzis sufiĉe streĉan metodon por hardi nian argumentadon. Ni ŝuldas al la devo repliki al provokaj demandoj sufiĉe bonan sukceson, kaj ni certe progresis pri interŝanĝado de argumentoj.

Multaj el ni ankaŭ laboris por la preparado de la UK kaj de ĝia junulara programo FESTO.

Fine ni decidis aranĝi la 4-an IASI en Liono, ĉe KoToPo (vd. apr., p. 76), pri la temo "Kiel plimulti la aliĝantojn al la E-movado?"

Vincent Charlot, [Desperant@worldnet.fr](mailto:Desperant@worldnet.fr)

**Influo** aperas kiel regula suplemento al *Esperanto*. **Redaktoro:** Geoffrey Greatrex, Dept. of Classics, Dalhousie University, Halifax, Nova Scotia, Kanado B3H 3J5. **Informa Fakto de UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎ +31 10 436 1044; 📠 +31 10 436 1751; ✉ [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)



### Svedio: Verdula kongreso

Pli ol 600 partoprenantoj de la ĝis nun plej granda nacia kongreso de la svedaj verduloj (21-23 majo, Västerås) povis preni E-informilojn de librotablo kun bone videbla flageto, tablo kiun prizorgis la loka E-klubo. La informilojn disdonis — kun helpo de interesata loka verdulo — Gunnar Farm, kies E-rilata propono estis diskutita en malgranda kunsido, sed ne akceptita. (Wim Posthuma)

### Hispanio: Ĉe bazaro en Eŭskio

La unuan dimanĉon de ĉiu monato, la E-Grupo de Bilbao instalas inform-tablon en la plej vizitata placo de la urbo, kadre de ĉiudimanĉa bazaro de uzitaj libroj kaj revuoj, interŝanĝejo de poŝtmarkoj, moneroj, telefon-kartoj ktp. (Miguel Gutiérrez Adúriz).

### Brazilo: Ekspozicio

En malgranda butikcentro de la urbo Presidente Prudente la juna aktivulo Reinaldo Marcelo Ferreira organizis "ExpoEsperanto" (23-27 apr.), kun libroj, periodaĵoj, UK-afiŝoj, kasedoj, portugallingvaj gazetartikoloj pri Esperanto, bildkartoj k.s. Televidilo konstante montris la kurson *Mazi en Gondolando*. La loka taggazeto *Oeste Notícias* publikigis noton pri la ekspozicio kaj intervjuon kun Ferreira; ankaŭ aliaj publikigis raportojn pri ĝi. Loka televido nemallonge, favore raportis, aldonante informojn pri la lingvo. Kelkaj ekinterestitoj aĉetis Esperanto-lernolibrojn. (Reinaldo M. Ferreira).

### Norvegio: Ekspozicio

La klubo La Norda Stelo en Hamar uzis migran ekspozicion de Norvega E-Ligo por informbudo en "Internacia Tago", la 20-an de junio. La loka gazeto *Hamar Arbeiderblad* elektis la E-budon por kolora bildo duonpaĝa. Kvin homoj aliĝis al aŭtuna kurso. (Norvega Esperantisto)

### Francio: Ekspozicio

Junaj esperantistoj disdonis novan koloran faldfolion en la Pariza "Expolangues" (29 jan.-1 feb.). Tiukaze pluraj revuoj aludis Esperanton; montriĝis intereso ankaŭ pri komputil-reta kurso de la lingvo. (Franca Esperantisto).

### Ĉinio: Ekspozicio

La aktivuloj de Donghua Esperanto-Domo prove okazigis E-ekspozicion en 200 m<sup>2</sup>-a halo de la provinca biblioteko (28-30 majo), montrante centojn da libroj, historiaĵojn, poŝtmarkojn, vidbendojn, interretaĵojn ktp. La biblioteka aŭtoritato tre alte taksis tiun arangon kaj volus gardi ĝin kiel konstantan programon de sia ĉiujara "legig-semajno". Sur ĉi tiu bazo estos lanĉita konstanta montrejo en la Donghua E-Domo, kiu esperas ricevi de helpemuloj pliajn E-publikigaĵojn kaj ekspoziciindaĵojn. (Adreso: p/a Peng Zhengming, 301 Dong 3-2, Meiyan Xiaoqu, Fujiao, Wuchang, CN-430070 Wuhan, Ĉinio; [dedhea@public.wh.hb.cn](mailto:dedhea@public.wh.hb.cn))

Inspire de Kampanjo 2000 de UEA kaj de la Manifesto de Prago, mi ekagis. (Cent obstakloj min baris ĝis akiro de ĉi ties hungarlingva varianto kaj de inform-materialoj nacilingvaj ĝenerale — kronika problemaro, nepre solvenda.) Post multobligo de la Manifesto kaj farinte el ĝi ekstrakton por tuja, surloka klarigo, mi komencis mian rondiron ĉe la geamikoj kaj gekonatoj, apogate de helpopreta, kunlaborema familia fono. Iom post iom mi kunigis 200 subskribojn, ne nur formale, sed dissemante ĉiupaŝe informon post informo, laŭnecese kaj laŭdezire pri Esperanto kaj ĝia vivosfero. Strategia punkto de mia "mikrokampanjo" estis la baza lernejo kun hungara instrulingvo (mia ekslaborejo), sed bonvole sci-

## "Mikrokampanjo 2000": Subskribis

El la celoj de Kampanjo 2000, Helena Seres en Slovakio plej ŝatas agi por "altigi la prestiĝon de Esperanto per inform-kampanjoj". Dank' al ŝiaj klopodoj, nia lingvo ĝuas grandan konatecon en ŝia loĝloko kaj eĉ ludas trafan simolan rolon en lando kie malmankas lingvaj konfliktoj.

volemis kaj subskribis la liston kuraĉistinoj, komercistoj kaj aliaj kontaktitoj. (Nur tempomanko limigas pluan tiucelan agadon.)

Regule mi informadis nian urbestron pri interesaj eventoj de la E-movado kaj pri miaj plej impresaj travivaĵoj. Sekve, post la UK de Prago li tre afable akceptis miajn gastojn, du kunlaborantojn de *El Popola Ĉinio*: li donacis al ili simbolajn objektetojn kaj disponigis aŭtomobilon por ĉirkaŭveturo.



Dum tradicia aŭtuna foiro — kiu koincidis kun la kutima Ago-Tago pasintan oktobron — kun du helpantoj mi distribuis foliojn en la lingvoj hungara kaj slovaka, elektitajn el la kvardek-lingva serio de TEJO *Kio estas Esperanto?* Vizitantoj el Usono kaj Svislando portis hejmen miajn inform-materialojn eĉ en la angla kaj germana lingvoj.

### Bonvenon en Viĉany!

Tumulto da vortoj preskaŭ blokas nun

## rimedoj/materialoj

### Hispanio: Gluaĉiŝeto

E-grupano en Bilbao eldonis gluaĉiŝetojn sur oranĝa fluoreska papero (14,6x5 cm) kun la retadreso de Hispana E-Federacio. Ili montriĝas tre taŭgaj por informado precipe en ciberkafejoj kaj universitataj medioj. (Miguel Gutiérrez Adúriz).

### UK: Afiŝo

Rezulte de la laboroj de la 2-a Interasocia Seminario pri Informado (vd. marto, p. 47), estis kreita kolora, franclingva afiŝo pri la Montpeliera UK, en formato A2 (42x60 cm). 2000 ekzempleroj estis presitaj. Ĝi estas akirebla, je modesta prezo, de Bruno

Flochon ([bflochon@esperanto.org](mailto:bflochon@esperanto.org)). Spaco en formato A5 estas lasita libera por aldonado de lokaj informoj. (*JeuneEspéranto*)

### Francio: Interna informado

Unuiĝo Franca por Esperanto publikigas, krom la monata revuo *Franca Esperantisto* por siaj membroj, la franclingvajn periodaĵojn *Espéranto-Actualités* (por la simpatiantoj) kaj *La lettre de l'espéranto* (por la uzo de amas-informiloj). Por la centjariĝo de UFE en 1998, aldoniĝis kvarpaĝa franclingva bulteno ĉiumonata, *Okazas*, kiun redaktas staĝanta studento pri ĵurnalismo, kun la celo rapide informi la UFE-membrojn pri la eventoj de la jubilea UFE-jaro. (*Franca Esperantisto*, *Okazas*)







Foto: Komplete de Helena Seres

de majo estiĝis la unua ZEO en nia vilaĝo, unikajo tiaspeca eĉ en nia tuta lando. Ho! La almetitaj fotografaĵoj jam malkaŝis ĝian esencon, sed komentario ŝajnas neevitebla. Jen:

Antaŭ du jaroj — okaze de historia jubileo — la urbestro starigis salut-tabulon ĉe ĉiuj tri en- kaj elirpunktoj de nia (baldaŭ urboranga) vilaĝo. La simbolaj koloroj de la komunumo estis pentritaj laŭ kvin strioj sur la tabuloj. Inter la du supraj kaj du subaj strioj — en kiuj paradas konvenigaj frazoj en la lingvoj slovaka (la ŝtata lingvo), hungara (loka majoritata lingvo), germana kaj angla — restis neokupita la plej larĝa, meza, verdkolora zono. Vi ja divenis: dialogo kun la kompleza urbestro, pozitiva reago, "memorigo" eĉ ne multfoja. . . Nu: "Bonvenon en Vlčany!" — unu tabulo ĝuste ĉe la eniro de nia strateto — estis inaŭgurita per konversacio kun la pli aĝaj lernejoj, akompanataj de la lernejestro. Multobliĝis la intereso pri Esperanto ankaŭ ĉe la du najbaraj belulinoj (kiuj ridetas sur la apuda bildo), sed mankas instruantoj. Restas aranĝi, parkigi la grundon ĉirkaŭ

"nia" tabulo, kiu ja lokiĝas en centra punkto de du grandaj vilaĝoj (Vlčany kaj Neded, po 4000 loĝantoj), ĝemelaj laŭpozicie.

Plene mi konkordas kun la alvoko de Renato Corsetti (marto, p. 46), kaj el la tri agoceloj proponitaj mi elektis la duan, akordigeblan al la agadvolvo de esperantistoj vivantaj ĉie ajn: "altigi la prestiĝon de Esperanto per inform-kampanjoj al neesperantistoj". Mia "fiksa ideo" ja estas ke la vojo al la ĝenerala disvastiĝo de Esperanto kondukas precipe tra la normala, lerneja lingvoinstruado, pli facile atingebla en socia atmosfero favora al neŭtrala lingvo; atmosfero kiun ni ĉiuj, seriozaj esperantistoj, povas evoluigi, eĉ se "nur" sur nia propra vivtereno.

Helena Seres (Slovakio)

Solidaraj civitanoj de Esperantio: helpu demonstri ke la bonvolaj faroj de eksteruloj favore al nia afero eĉas tutmonde. Sendu kelkajn gratulvortojn (Esperante kaj vialingve), sur bildkartoj pri viaj loĝlokoj, al la urbestro: S-ro JUDR. Jozef Cibula, SK-92584 Vlčany, Slovakio.

## amaskomunikiloj

### Irano: Gazeto

La irana semajngazeto *Ĝavanan* ("Junularo") aperigis (25 majo) tradukon, fare de Akbar Fekri, de la artikolo "Ĉu ni estas solaj?" de Amri Wandel, aperinta en *Kontakt* (n-ro 157). La tekston ornamis la koncerna kovrilo de *Kontakt*. Enkonduko klarigis pri Esperanto, la aŭtoro kaj la revuo *Kontakt*. En la pasintaj jaroj rimarkinde plivigliĝis la aperado de tradukoj el Esperanto en la persa gazetaro. (M. Reza Torabi)

### Aŭstrio: Gazeto

"Esperantistoj esperas je nova ŝanco" titoliĝis duonpaĝa artikolo (24 marto) en la ĵurnalo *Standard* (380 mil legantoj), i.a. kun intervjuo kun la direktoro de Internacia E-Muzeo, Herbert Mayer. Oni fine legis: "Ne malforto, sed ŝanco por la estonteco estas la fakto ke Esperanton ne subtenas politika aŭ ekonomia potenco." (Walter Klag)

### Belgio: Radio

La 29-an de aprilo unuhora programo de la flandra Radio 1 pritraktis la demandon:

"Ĉu post eŭro, estas nun tempo enkonduki ankaŭ komunan (duan) lingvon en Eŭropo?" La demandon prezentis e-isto Dan Van Herpe, kiu bone kaj konvinke argumentis por Esperanto en la studio. (*Horizontaal*)

### Slovenio: Teleteksto

La teleteksto de TV Slovenio havas regulan semajnan paĝon (311) pri Esperanto jam pli ol 8 jarojn. De la komenco en 1989 ĝis februaro 1997 la paĝon redaktis Janez Jug, kun kelkmonata helpo de Marija Zlatnar kaj Anka Vozlič. Nun la redaktorino estas Anka Vozlič. (Janez Jug).

### Kongo (Dem. Resp.): Gazeto

*Le Nouvel Hebdo*, semajna gazeto eldonata en Kinŝaso, aperigis en marto plurkolumnan artikolon pri Esperanto, notante la subtenon de iuj eminentuloj — kiel ministro el Jemeno kaj irana ambasadoro. (Michel Dialundama)

### Kroatio: Televido

En junulara programo de Kroata Televido, "Babilejo" (45 min.), du mezlernejanaj teamoj argumentas por kaj kontraŭ iu temo, antaŭ triopa ĵurio. La 9-an de majo 12 junaj kursoj de la Zagreba E-klubo Bude Borjan

defendis Esperanton. Subtene al siaj starpunktoj ili montris la funkciadon de Esperanto kiel familia lingvo per filmo de Romana Rožić kaj Kruno Tišljar (profesiuloj de Kroata Televido kaj ambaŭ aktivaj Zagrebaj esperantistoj), *Kreski kun Esperanto* (36,00 gld. ĉe la Libroservo de UEA), kaj paroligis la invititajn gast-fakulojn Zorislav Šojat kaj Spomenka Štimec. Du el la tri ĵurianoj decidis favore al Esperanto. (Spomenka Štimec, Interredaktore)

### Norvegio: Gazeto

Intervjuo kun la Esperanta verkisto Johan H. Rosbach aperis en la norvega loka gazeto *Sarpsborg Arbeiderblad* la 16-an de majo. (*Norvega Esperantisto*)

### Francio: Gazeto

La februara numero de la municipa gazeto de Laon, senpage disdonita al ĉiuj hejmoj (15 mil ekz.), enhavis artikoleton pri Esperanto, sekve de la inaŭguro de rondplaco Zamenhof (vd. apr., p. 77). (*Franca E-isto*)

### Britio: Gazeto

Brian Burnett (Norda Kimrio) artikolis pri E-o en la marta numero de la gazeto *Yours*, kiu celas homojn super 50 jaroj. (Brian Burnett)

## Kolekto de konvinkajoj

Celante provizi pledantojn por nia lingvo per faktoj kaj informoj, mi intencas kunmeti kolekton de taŭgaj, nerifuzebaj, impresaj kaj konvinkaj informoj pri la evoluo de nia lingvo. Tial mi petas ke vi sendu al mi precizajn, prefere aktualajn sciigojn pri la atingoj de E-o en la terenoj de politiko, kulturo, informadiko ktp. La rezultojn de la serĉado mi publikigos.

Mi bezonas i.a. jenajn informojn: Kiom da lingvoj ekzistas sur la Tero? Kiu estas la lando kun plej multaj lingvoj? Kiom da esperantistoj (lingvokonantoj aŭ/kaj movadanoj) estas en la mondo? Kiom da E-hejmaĵoj ekzistas? Ĉiu informo havu fontindikon kiel eble plej precizan.

Ni serĉadu kune!

Josenilton Passos do Nascimento  
✉ kongreso@svn.com.br



# La angla, ĉu sola lingvo por EU?

## Centra ret-informejo ekzistas

En *Influo* 16 (marto, p. 50) Ian Fantom skribas ke ne ekzistas "unu simpla Interreta adreso" donebla "al ĵurnalistoj k.s."

Fakte, ĝuste por tiu celo ekzistas "Multlingva Inform-Centro pri Esperanto" kun la simplega adreso <www.esperanto.net>, ĉe kiu kolektiĝas (ligoj al) priesperantaj TTT-ejoj diverslokaj kaj diverslingvaj. Ĝus mi aldonis kiel tridekduan lingvon la romanĉan. Speciale en la angla lingvo, kiun Ian Fantom verŝajne unuavice celas, ekzistas abunda informmaterialo: pri la lingvo, pri diversaj organizaĵoj, pri kursoj ktp, ĉio klare ordigita kaj facile trovebla. Al interesatoj pri Esperanto oni nepre ĉiam donu tiun TTT-adreson! Nun ankaŭ ekzistas la eblo krei ligojn el aliaj Esperanto-rilataj TTT-paĝoj rekte al <www.esperanto.net> per la rekomenditaj ligbutonoj troveblaj en "http://www.esperanto.net/info/ligu\_eo.html". Uzante tiujn butonojn kun hiperligo al <www.esperanto.net> oni facile kaj eleganta ebligas informiĝon pri E-o en lingvo taŭga por la vizitanto, sen bezono mem ripeti jam ekzistantan inform-amason.

**Martin Weichert**

✉ [martinw@cs.chalmers.se](mailto:martinw@cs.chalmers.se)

## Respondo de Ian Fantom

"Multlingva Inform-Centro pri Esperanto" estas ja bonega direktilo al diverslingvaj artikoloj pri Esperanto. Sed ne tion mi celas. Ĵurnalistoj aŭ parlamentano en specifa lando kutime bezonas ne liston de artikoloj pri Esperanto, sed koncizan superrigardon de la nuntempa *agado* en sia lando — pri ĵurnalaro, parlamenta agado, lokaj kluboj, E-lingvaj diservoj, kursoj, lerniloj, fondusoj k.s. Tion oni ne facile trovas, se la informoj tiulandaj ne estas kolektitaj kaj koncize prezentitaj.

Ankaŭ aliaj trovos tian kompilaĵon utila: ekz. novaj esperantistoj samlandaj, aŭ vizitantaj e-istoj el eksterlando, kiuj povos trovi eĉ ligojn al trajnhoraroj. Kompreneble, ankaŭ la paĝo "http://esperanto.org/uk/" ("Esperanto en Britio") havas ligojn al <esperanto.net>, kaj ankaŭ <esperanto.net> donas ligojn al "Esperanto en Britio".

Mi deziras do instigi ion similan ankaŭ en aliaj landoj. Kun serio da paĝoj "Esperanto en ...", ĉiuj listigitaj en <esperanto.net>, ĉi lasta fariĝos des pli utila.

**Ian Fantom**

✉ [ian@mintex.demon.co.uk](mailto:ian@mintex.demon.co.uk)

## Ago-Tago, 1 el 365

Por multaj el ni iel ĉiu el la 365 tagoj de la jaro estas Ago-Tago Esperanta. Kial tamen fari ion apartan por informi la publikon pri E-o ĝuste la 3-an de okt. (tradicie, la unuan sabaton de la monato)? Ĉar multaj tiam tutmonde agos same: en si mem imprese por ĵurnalistoj! Sciigu la Informan Fakon pri viaj planoj ĝis la 15-a de sep., por ricevi liston de ĉiuj agadoj anoncitantaj.

**"Ĉu la angla estu la sola oficiala lingvo de Eŭropa Unio?" Tiel sonis lastatempa diskut-demando — por esperantistoj evidente ŝoka — de la tutmonde aŭskultata brita radio BBC.**

**E**n kelkaj juniaj tagoj la diskuto restis malfermita sur la Interretaj paĝoj de BBC. Eblis tie voĉdoni per jeso aŭ neo kaj ankaŭ detale doni sian opinion. La rezulto, ŝajne definitiva, estas 63% da jeso kaj 37% da neoj al la angla: lingvopolitika absurdaĵo, tamen ne surpriza, se konsideri ke la koncernan radioprogramon de BBC aŭskultis homoj kiuj scipovas la anglan sufiĉe por... aŭskulti radioprogramon de BBC.

Tamen, jesantoj ŝajne ofte domagis elvolvi siajn argumentojn, ĉar nur dekduo el la 58 reagoj\* senkondiĉe subtenas la anglan kiel solan oficialan EU-lingvon, kaj kelkaj pliaj favoras ĝin kun diversaj kondiĉoj (foje kuriozaj), kiel modifo de la prononc-normo, garantio de prioritato al la naciaj lingvoj kaj dialektoj, aŭ eĉ la postulo ke unue Britio forlasu la Union. Iu vidus solvon en la kuna uzo de la angla, franca kaj germana (alia aldonus la hispanan). Tria proponas, por eviti akuzojn de kultura imperiismo, la nederlandan (!) por ĉefrolo, sed pensas ke taŭgus ankaŭ Esperanto, ĉar ĝi havas la saman avantaĝon.

Fakte, 20 homoj eksplacite subtenas (aŭ preferas) Esperanton por tiu funkcio, dum kelkaj aliaj mencias Idon, Interlingua aŭ "neŭtralan internacian lingvon" sen precizigo.

Ĉi-sekve ni citas kelkajn opiniojn, nur de esperantistoj. (Ne pro partio, sed pro kopirajtaj kialoj: nur de ili ni povis akiri permeson por rekta cito.)

"Ĉu la angla ne mortigis jam sufiĉe da lingvoj en la insuloj kaj la cetero de la Brita Imperio? Ĉu ni subtenu pluan mortigon de lingvoj en kontinenta Eŭropo kaj subfosadon de la kultura riĉeco de Eŭropo?" (*Ionel Oneț*, Rumanio/Usono)

"Paradokse, la plej bona maniero antaŭenigi la anglan kiel solan EU-ling-

von estas eviti debatojn pri lingvoj! Lasu la aferojn evolui kaj atendu ĝis estos tro malfrue por elekti alian lingvon..." (*J.-S. Brilleaud*, Francio)

"Unue mi pensis ke temas pri ŝerco!

Kion vi sincere pensas pri la kvalito de la angla parolata de ne-anglalingvanoj? Ĉu vi volas ke nur angloj parolu libere en EU?" (*Maurice Sujet*, Francio)

"...registroj devus esti justaj al la ŝtatanoj. Elekti la anglan aŭ kiun ajn alian eŭropan lingvon kiel solan regad-lingvon estus maljusta plurilite. (...) Denaske anglalingvaj eŭro-parlamentanoj kaj komisionanoj ĝuus avantaĝon kaj superregas en politikaj debatoj." (*Mark Rauhamaa*, Finnlando/Usono)

"En Koreio ni elspezas enormajn kvantojn da mono por lerni la anglan. Kalkulante laŭ mia persona sperto, mi povus kvinfoje doktoriĝi, se mi ne estus devinta lerni la anglan." (*Kim Hiongun*, Koreio)

"Mi ne povas akcepti la proponon: mi estas italo, kaj mi volas konservi mian kulture heredaĵon." (*Roberto Tresoldi*, Italio)

"Angla-lingvanoj ne devus simple supozi ke ilia lingvo estas supera (ĝi certe ne estas) kaj ke aliaj de-

vus lerni kaj uzi ĝin." (*Stevens T. Norvell Jr.*, Kanado)

"Mi donos al la elpensinto de ĉi tiu ideo noton "A" pro aroganteco. Se valoras havi solan komunan laborlingvon (kio pruveble valoras), tiu lingvo devus esti tute neŭtrala, ne donanta en si mem ian avantaĝon al iu ajn etna aŭ politika grupo." (*William R. Harmon*, Usono)

\* Ĉe [http://www.news.bbc.co.uk/hi/english/talking\\_point/newsid\\_113000/113492.asp/](http://www.news.bbc.co.uk/hi/english/talking_point/newsid_113000/113492.asp/)





# Reagoj



## Zamenhof, Coué: Logika ligo

Iom surprizis min la komenco de la recenzo de d-ro B. Berthonneau pri *Mi resanigis PPPetron* (majo, p. 94): “Sajnas ke... Émile Coué... furoretas en nia komunumo. (Ĉu mi ne legis, antaŭ kelka tempo, strangan kolizion de Zamenhof kaj Coué reklame al la libro *L’homme qui a défié Babel*?...) Tio estus malbona aŭguro, konfirmo de nia dubinda farto.”

Kunaŭtoro de *L’homme qui a défié Babel*, René Centassi verkis biografiaĵon ne nur pri Zamenhof, sed ankaŭ pri Émile Coué, ĉar — kiel li mem klarigis al mi okaze de libroprezento en mia urbo Rennes — li interesiĝis pri homoj proponintaj al la homaro simplajn rimedojn, kiuj ne riĉigas iun ajn per mono, sed plibonigas ilian vivon. Do, logike, kiam aperis la biografio de Zamenhof, estis menciita ankaŭ la alia verko de Centassi.

Mi devas konfesi ke antaŭ tio, kiel plej multaj francoj, la nomon de

Coué mi ligis al io ridinda, kaj mi ne provis scii ion ajn pli pri li. Mia renkonto kun René Centassi ebligis al mi ne nur koni la veron pri la metodo de Coué, sed ankaŭ kompreni kial tiuj kiuj ne interesiĝas pri Esperanto, plej arde kontraŭas ĝin, skribante kaj dirante malveraĵojn aŭ stultaĵojn pri la internacia lingvo, bedaŭrinde eĉ kiam ili metas “d-ro” antaŭ sian nomon. Jen la danĝero.

Franciska Toubale  
(Francio/Aŭstralio)

## Kuraĝa batalinto

Dankon pro la artikolo (apr., p. 78) pri la brita ĉefredaktoro W. Th. Stead, kiu pereis kun la oceanŝipego Titaniko en 1912. Mi ne sciis ke li aktive apogis la internacian lingvon, sed pri lia kuraĝa batalo kontraŭ infanprostituado kaj komerco de blankaj sklavinoj mi iam legis romanon: *The Abductors* (“La forkaptantoj”, 1970) de Stuart Cloete.

Eskil Svane (Francio)

## Komuniko de Instituto Ivo Lapenna

**Koncerne artikolon kiu aperis en la revuo *Monato* (jan. 1998, p. 8), ni ricevis kopion de letero de prof. Carlo Minnaja, prezidanto de Internacia Instituto Ivo Lapenna, al tiu revuo. Konforme al lia peto, apogita de d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof, ni publikigas eltiraĵojn el la komuniko.**

“En la lastaj numeroj de *Monato* treniĝas polemiko pri historia evento: murdado de judoj en Kielce. Pri historio debatu historiistoj. Mi volas nur aludi vortojn kiuj povis havi interpreton de ksenofobio. Kiel prezidanto de Internacia Instituto Ivo Lapenna mi volus precizigi ke

— Instituto Ivo Lapenna **neniam** povas aprobi frazojn kiuj eĉ plej pale povas aspekti kiel malamaj, rasismaj aŭ ĉiukaze diskriminaciaj surbaze de la nacieco aŭ de la lingvo. Tial ĝia kondamno de tiaj frazoj estas neta kaj senkompromisa.

— Ĉia ajn esprimo kiu eĉ plej ete forvojiĝas de la ĉi-rilata ideo de Ivo Lapenna metas aŭtomate la verkinton ekster la membraron de la Instituto.

Tial personoj kiuj jam rekte subskribis tiujn vortojn aŭ eventuale poste apogus ilin ne estas (plu) membroj de la Instituto kiu gardas la honoron porti la nomon de Ivo Lapenna.

Tia anonco iĝis necesa por ke ne estu eĉ plej eta konfuzo inter personaj opinioj kaj la pozicio de la Instituto; kvankam la diverseco de la ideoj kaj la libereco de la esprimado estas daŭre gardataj kiel grandaj valoroj, tamen interne de nia scienca instituto ne povas kunesti malsamaj vidpunktoj pri tiaj bazaj demandoj kiel la absoluta respekto al ĉiuj nacioj kaj ĉiuj kulturaj grupoj.

**Prof. Carlo Minnaja, prezidanto de Internacia Instituto Ivo Lapenna”**

Ame kaj klere  
verkita klasikaĵo:

## Vivo de Zamenhof

(1920)

de Edmond Privat

134 p. 18 cm.

Bind. 18,90 gld.

Triona rabato ekde tri ekz.

## Legi pli pri laborintoj

Kelkfoje mi ŝatus legi en via revuo pri simplaj personoj kiuj ne plu vivas sed kiuj laboris la tutan vivon por nia lingvo. Mi pensas pri Catina kaj Mario Dazzini, kleraj pedagogoj kiuj esperantigis multajn homojn, helpante ilin eĉ telefone. Ili estis ankaŭ grandaj amikoj de la plej neforge-sebla prof. Szerdahelyi, plej grava instruisto, kiun mi bone konis. Mi dezirus legi ion pli pri ili ĉiuj.

Carla de Lorenzi (Italio)

## Sen angoroj


Interesplena artikolo (“Esperanto aldonas vivjarojn!”, apr., p. 67) de U. Matthias! Dum sendormaj noktoj mi kontrolis kaj, feliĉe, aprobas la kalkulojn prezentitajn. Tamen, io tiklis min... Jen la tubero en la afero! Vi certe rimarkis: la kalkulo baziĝas sur la listo de dumvivaj membroj (DM)!

La motivoj prezentitaj de Matthias estas neniel dubindaj, sed DM havas pluson kiun oni ne povas prisilenti. Tiu eta milo da Esperantoj ne konas la angoron kiu ŝufokas la ordinariajn abonantojn: forgesi pagi la kotizon. Ne diru: “tio ne povas frapi min”. Vi certe estas tre juna se vi nenion forgesas. Mi mem falis en longan malsanon = neaboniĝo! Kiam mi edzinigis plaĉan knabinon = neaboniĝo! De pluraj jardekoj mi ne plu suferas turmenton, kaj kia lukso konstati ke mi estas en la kategorio de la long-vivuloj!

Gojano (Longvivujo)



# Recenzoj



## La knabino kiu ne ekzistis

**Aminda.** Leendert C. Deij (1919). Prilly: LF-koop, 1997. 103p. 21cm. 33,00 gld.

Ĉi tiu libro prezentas dilemon al recenzanto — ĝi estas nek lakto nek selakto. Temas pri knabineto, Aminda, kiu denaske lernas Esperanton. Ŝi tamen neniam ekzistis. La aŭtoro kunigis ĝeneralajn observojn pri infana lingvo-akirado kun kelkaj publikigitaj raportoj pri veraj denaskuloj Esperantaj, sed kompreneble multaj detaloj estas nur imagitaj. Kiel beletra verko la libro estas tro longa kaj teda (malgraŭ la flua, vere modela stilo), sed kiel faka verko ĝi estas nefidinda kaj eĉ neinteresa.

Aminda estis verkita antaŭ duonjarcento, kio parte klarigas la spekulativan, eĉ eraran, priskribon de kelkaj flankoj de lingvo-akirado. Ekzemple, Aminda nomas porkon "afo" (ŝafo) ĉar ŝi, laŭ la libro, ne distingas la du bestojn percepte. Pli verŝajne ŝi (se ŝi do ekzistis) nur troĝeneraligas la signifon de la

LEENDERT C. D.



## Epopeo de la homaro

**Vivo de Prometeo.** B. Tornado (ps. Boris Tokarev, 1927-94). Moskvo: Impeto, 1996. 263p. 20cm. 24,90 gld.

Kiel konate, en la klasika mitologio Prometeo estas la genio de la fajro, iniciatinto de la civilizacio. Li formis la homon el surtera argilo kaj kiel animon donis al li la fajron ŝtelitan el la ĉielo.

La aŭtoro de ĉi tiu epopeo de la homaro atribuas lian nomon al la homo kiu, por sin defendi de malvarmo, komence povis kalkuli sole je fajro el trunko hazarde ekbrulanta pro trafo de fulmo, ne ŝtelita, sed falinta el la ĉielo kaj kun ekstrema zorgo konservata. Tiam la simbola figuro Peo malkovras ke ne necesas atendi la naturan ekeston de fajro, sed ke per interfrotado de du silikpecoj eblas

ĝin estiĝi, kie kaj kiam konvene, kaj ankaŭ ĝin regi. Tiel komenciĝas la progreso de la homaro, ekzemple pro la eblo pli longe teni manĝebla la nutraĵon, eliminante la neceson eliri por akiri freŝan ĉasaĵon ĉiufoje kiam malsato premas. Same, la fajro hardas lignon, kiu tiel taŭgas por fabriki ĉasilojn kaj armilojn, pli rapide ol per polurado de ŝtono. La ŝparitan tempon la homo nun povas uzi por plua

pensado, inventado de utilaĵoj, kiel ekzemple la rado, ekestinta el ruliĝanta trunko, pafarko kaj muzik-instrumento el streĉita kordo, kaj eĉ por arta kreado. Li ankaŭ ne plu bezonas

konstante forvagi, sekvante migrantajn bestojn, kaj lernas kultivi la grundon kaj malsovaĝigi bestojn, produktante surloke kion li antaŭe hazarde kaj nur pene trovis. Li ankaŭ komprenas ke per la formado de pli kaj pli ampleksaj grupigoj — familioj kaj klanoj — li pli bone povas sin protekti kontraŭ la hazardoj de la medio kaj de la agresemo de siaj kunhomoj.

Evidente Peo simbolas la pioniron, la homon

kiu en multaj sinsekvaj generacioj portas sian kontribuon al la progreso.

Ĉio tio estas rakontita versforme, kiel decas al epopeo, tamen ne per klasika aleksandro aŭ deksilabo, sed per sepsilabaj rimitaj versoj, facile fluantaj kvazaŭ prozo. Multaj mikrolustraĵoj de bestoj, krom la surkovrila ŝtonepokulo, ornamas ĉi tiun legindan verkon.

*Leopoldo Knoedt (Brazilo)*



## Voĉo el la postdomo

**Taglibro de Anne Frank** (1942-44). Anne Frank (1929-45). El la nederlanda trad. Nora Bartels. Tokio: Libroteko Tokio, 1997. 299p. 21cm. 42,00 gld.

Unuavide sur la antaŭaj paĝoj la fotoj de Anne, ŝia fratino, ŝiaj gepatroj kaj aliaj igas onin murmuri en la koro: se ne okazus la milito, se en la mondo neniam troviĝus rasa antaŭjuĝo... la familio Frank vivus kiom bone, Anne fariĝus kia homo, kaj ŝiaj idoj generacion post generacio... Sekve la enhavo estiĝinta en



Pro la Universala Kongreso en Montpeliero, la Centra Oficejo de UEA estos fermita ekde la 31-a de julio ĝis la 9-a de aŭgusto inkluzive.



vorto. Ankaŭ la priskribo de la komenca stadio de la lingva son-perceptado estas pli-malpli mala al tio kion malkovris modernaj instrumentoj de cerbo-mapado.

Kvazaŭ pasintjarcentaj sonas la asertoj ke en iuj "primitivaj lingvoj" aŭ "barbaraj idiomoj" postrestis bebaj parolsonoj, mankas la distingo inter substantivoj kaj verboj, aŭ tute mankas verbotempoj. Substantivoj kaj verboj troviĝas en ĉiuj lingvoj de la mondo

(almenaŭ tiom kiom en Esperanto!), kaj la manko de verbotempoj ne faras iun lingvon pli "primitiva" ol faras ekzemple la nederlandan la manko de pluraj utilaj verbokategorioj, kiujn bulgaroj konsideras esencaj en sia lingvo.

Ankaŭ kiel priskribo de esperantlingva etulino la libro impresas nerealisme. Aminda ŝajnas kreski en unulingve Esperanta medio, kio en vera vivo okazas maloftege. Ŝiaj imagitaj fruaj frazoj ne konformas al miaj scioj pri la lingvaĵo de etaj

denaskuloj: kiam Aminda jam formas kvarvortajn frazojn kun diversaj frazopartoj, al ŝi ankoraŭ mankas la artikolo kaj la akuzativo (eĉ singulara).



## Blonda leporo kaj Urso brunulo

Jen bela novaĵo en la magra branĉo de nia poezio por infanoj. Kolekto de 57 poemoj de 22 poetoj, ĉio en flua kaj ofte surprize bela traduko.

## Al la mondo donace

Antologio de la serba porinfana poezio

Elektis kaj el la serbokroata tradukis Zlatoje Martinov. Beograd: Strategia, 1996, 80+80p. 20cm. Dulingva. Kun notoj pri la aŭtoroj. Prezo: 24,00 gld.

Triona rabato ĉe samtempa mendo de minimume 3 ekz. ĉe la Libroservo de UEA.

Gravaj kaj ĝustaj ŝajnas al mi tamen la observoj ke la frua lingvo-akirado baziĝas sur intensa interagado inter la bebo kaj la gepatroj (kvankam la patro restas tre fone en ĉi tiu rakonto), kaj ke iuj infanoj alproprigas frazmelodiojn jam antaŭ ol ili uzas la unuopajn vortojn de la imitataj frazoj. La aŭtoron inspiris sincera admiro de la miraklo de lingvo-akirado, sed, escepte de kelkaj interesaj citaĵoj el pioniraj raportoj pri denaskuloj (Butler, Birkeli), Esperanto aperas en la libro tute superflue. Oni divenas ke la aŭtoro posedus pli subtilajn kaj fidindajn notojn pri la evoluo de infanoj nederlandlingvaj.

Min persone iom forpuŝis ankaŭ la provo doni en la enkonduko kvazaŭian ideologian enhavon al denaskismo, kiu ja ne estas idea ismo, sed nur

socia fenomeno. La eldonisto rekomendas la libron al la leganto sendepende de tio "ĉu vi estas por aŭ kontraŭ denaskismo"; sed se iu parolas al sia infano Esperanton, neniu eksteruloj bezonas esti por aŭ kontraŭ tio pli multe ol ili bezonas havi opinion pri la grandeco de la poŝmono por la infano. Laŭ la aŭtoro mem, "la transnaciaj geedziĝoj, la kreskanta nombro de denaskaj esperantistoj kaj la konturiĝanta 'popoliĝo' de la esperantistaro garantias naturan evoluon kiel vere komuna, socia interkomprenilo", kion mi ne vere komprenas; tio estas la sola neklara frazo en la tuta verko.

Bedaŭrinde el ĉi tiu libro, certe bonintenca, vi lernas nenion pri veraj denaskuloj aŭ iliaj gepatroj.

*Jouko Lindstedt (Finnlando)*

la senluma kaŝejo, el la splena profundo de 13-jara knabino, ŝarĝas legantojn peco-post-pece per simpatio, indigno, penso... Kia knabino vigla, scivolema, kapabla pensi kaj verke esprimi siajn pensojn kaj sentojn pri rilatoj inter homoj, pri idealo kaj realo! Sed la milito katenis ŝin kun la familio kaj pluraj aliaj ge-personoj en la postdomo skatoleska — sensuna, aer-manka, nepermesa paroli aŭ plori. Anne povis nur skribi al la notlibro pri siaj statoj senta, psika kaj iam fizika. Bedaŭrinde tiam nur la notlibro estis ŝia konfida kaj senenua amikino. En tiu situacio eĉ ŝiaj patrino kaj fratino ne tiom komprenis ŝin, nek la kunkaŝigantoj. Jes, la medio distordis la spiriton de homoj. Por ne paroli pri la

malamikoj murdemaj, eĉ inter la kunkaŝatoj ne mankis egoismo, miskompreno; rivalco eĉ inter la aŭtorino kaj ŝia fratino. Honesta estis Anne. Ŝi malkaŝis dolorojn ne nur promilitajn, sed samtempe ankaŭ tiujn pro siaj kunhomoj. Miskompreno ĉiam ĉie troviĝas. Ĉu ekskluzivismo estus homa instinkto? La juna Anne per sia taglibro pensigas al oni pri eterna temo: ĉu homo estus pli racia ol insekto, ol besto? Abelaro kaj formikaro povas harmonie kunlabori, tigro ne miskomprenas sian idon... kial ni homoj ne povas?!

Kaj pri la traduka lingvo. Nekontestebla evidente estas la bona legebleco. Nu, la tradukinto estas Nora Bartels, tramonde konata blinda esperantistino.

Neniu ne scias ke parol- kaj aŭd-kapablo de blindulo superas tiujn de ordinara homo. Krome, por ŝi Reza Kheir-Khah faris zorgan provlegon. Ni, legantoj, povas ĝui la fluecon de la frazoj kaj konvenecon de la esprimaj manieroj montrantaj la trajtojn de la juna knabino. Ho, se nia estimata s-ino Bartels estus iom atentinta pri tio ke en la libro troviĝas nomoj kaj aliaj vortoj neesperantaj kiuj por ni orientanoj nepoliglotaj malfacile voĉlegeblas! Feliĉe, tiaj vortoj estas nur kelkaj: nomoj de libroj aŭ homoj, lokoj. Sed, bedaŭrinde, nia sinjorino ne povas aŭdi mian voĉon. Ŝia forpaso estas por Esperantujo granda perdo.

*MAO Zifu (Ĉinio)*



# Pejzaĝo plej provenca

**La besto de Vakareso** (1926). Joseph d'Arbaud (1874-1950). El la okcitana trad. Jean-Luc Tortel. Dobřichovice: Kava-Pech, 1998. 96p. 20cm. 12,00 gld.

Traduko el la provenca lingvo estas pli ol salutinda. Post *Mirejo* de Mistral, kiu aperis esperantlingve en 1909, ni devis atendi la jaron 1988 por ĝui alian verkon de la sama aŭtoro, *La Poemo de Rodano*, en bonega traduko de R. Laval kaj modesta eldono de la SAT-broŝurservo. Ni ŝuldas nun al Jean-Luc Tortel la tradukon de ĉi tiu verko malpli konata, sed nepre malkovrinda, tiom pli ke, krom la franclingva traduko fare de la aŭtoro, ekzistas tradukoj nur en la lingvoj angla, germana kaj pola.

de la antikvaj duondioj, kadukiĝinta kaj baldaŭ malaperonta. Rekoneblas ĉi tie la simbolo de la morto de la tradicioj, kiun Mistral pritraktis en *La poemo de Rodano*. Por la “besto” de nia rakonto, same kiel por la malaperinta “drako” de *La poemo*, ne validas la optimismo de Gérard de Nerval (“[...] de l’ drak’ venkita dormas l’ antikva semo!... / Revenos tiuj Dioj, de vi ĉiam plorataj!”<sup>1</sup>). Post la miksitaĵoj de terurigo antaŭ la Besto kaj de kompato, eĉ de kunfrateco por ĝi, restos en la animo de la heroo

**La marĉoj de Kamargo sugeste fonas la mitologiecan rakonton de d’Arbaud.**




Foto: Jeanine Bony

En la mallonga rakonto ni malkovras la pejzaĝojn de Kamargo, la plej provenca el la provencaj regionoj, ties kreskaĵojn kaj bestojn, la laboron de la tieaj taŭro-gardistoj — ankoraŭ ekzistantaj nuntempe — kaj la lingvaĵon de d’Arbaud, malpli klasikan ol la Mistrala: la aŭtoro elektis la Arlezan dialekton, kio videblas jam en la titolo kaj ĉefvorto de la verko (*la bèstio* anstataŭ *la bèsti*) kaj krome flegis popolaroman sintakson. La fikcio prezentiĝas kiel la taglibro de taŭro-gardisto, vivinta en la 15-a jarcento, kiu dum sia bredo-laboro ĉirkaŭ la Vakaresa marĉego, en la Rodana delto, renkontiĝas kun fantasta estaĵo (la “Besto”), simila al mitologia Faŭno, postvivanto

nur sento de prema bedaŭro.

La traduko de Tortel, denaska parolanto de la provenca, estas kiel eble plej fidela. Ĝi eĉ ofte pli proksimas al la originalo ol la traduko, en tro klasika franca lingvo, kiun faris la aŭtoro mem. La kvarjara ĉevalido (*lou quatren*) estas nomata *la kvarjarulo*, dum en la franca versio ĝi estas nur ĉevalido<sup>2</sup>; *planuro* estas tradukita per *inundeblejo*, pli preciza ol la franclingva *plaine*; [*la vaco...*] *tira braso* estas lerte glosita per “kvazaŭ — kiel ni diras en nia lingvo — ĝi [*la bovino*] disigus braĝon” — kio ŝajnos iom parafraza, tamen pli bona ol foresto de tiu esprimo en la franclingva traduko, kaj ni povus citi aliajn ekzemplojn, eĉ por tiaj banalaj esprimoj kiel *tout lou mens à moun vejaire* (“almenaŭ laŭ mia opinio”), kiun la franclingva traduko iel malaperigas aŭ

## Pli ol romano

**Vivprotokoloj 1.** Red. Ulrich Becker. Intervjuis kaj prilaboris (1991-95) Zdravka Metz kaj Ulrich Becker. Berlin: Monda Kunagado — Kulturring in Berlin, 1995. 88p. 21cm. 7,80 gld.

Se vi pli interesiĝas pri homaj vivoj ol pri komputilado de Esperantaj klaĉoj kaj literoj, jen finfine via libro pri la vera esenco de Esperanto: lerni pri la vivo de simplaj homoj, konatiĝi kun fremdaj destinoj, aliaj sortoj. Ofte realo estas pli fantazia ol fikcio; tiuj 13 rakontoj de esperantistoj pri sia vivo estas pli riĉaj, pli nekredeblaj ol iuj romanoj. Zdravka Metz ankaŭ rakontas al vi kiamaniere vi povas malkovri tiajn romanecajn vivojn malantaŭ renkontiĝoj kun “simplaj” esperantistoj kaj kiel vi povas mem partopreni en tiu projekto pri vivprotokoloj (mi preferintus “vivorakontoj”).

Fabienne Berthelot  
(Francio/Nederlando)

paligas. Foje, la adapto al nia lingvo necesigas reverkon de la frazo: “ĉe la marbordo, la vento frakase ŝaŭmigis la grizaĉajn ondegojn” estas lerta solvo por la malfacila frazo *la mar grisasso, en boufant, salivavo long de la costo*. Sed estas nekompreneble kial la tradukinto tiel koncizigis la enkondukan paragrafon *Davans que de counta...* (“Mi komencos per incidento...”). En la frazo “Ien ajn Providenco suprenkonduku vin...” mi ja ne uzus la u-formon, sed preferus -os aŭ -us. Anstataŭ la “marĉoj Imperioj”, mi parolus pri “marĉoj de Imperianoj” kaj klarigus per piednoto kial ili havas tiun nomon. Fine, kelkaj plumeraroj (*konfeso* anstataŭ *konfeso*, problemoj de transitiveco kun la morfemoj *ĉes-*, *venen-*, *terur-*,...) devus esti korektitaj por igi la tradukon senriproĉa.

“Se tiu lingvo [Esperanto] povos diskonigi nian belan Provencon tra la mondo, pro tio mi tre ĝojos” (Mistral). Jean-Luc Tortel grave kontribuas al tiu celo, rivelante samtempe valoran verkiston kaj rakonton kun universalaĵoj reejoj.

Michel Duc Goninaz (Francio)

1. Traduko de G. Waringhien

2. Mi petas pardonon pro la ne-indiko de la paĝoj: la recenzo mi faris laŭ manuskripto.



# Laste aperis



**Alfluginta monto.** Ĉinaj popolaj rakontoj. Komp. Hua Jiqing. El la ĉina trad. Hao Duoren. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1998. 62p. ISBN 7 5052 0330 4. 18cm. 12 rakontoj el sud-orienta Ĉinio. 8,40 gld.

**Antologio latina.** *Volumo 1: Maturiĝo* (ĉ. 250-30 a.Kr.); *Volumo 2: Epoko de Aŭgusto* (31 a.Kr.-14 p.Kr.). Kompilis kaj el la latina trad. Gerrit Berveling. Chapecó: Fonto, 1998. 576p. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 30. Vasta panoramo, proza kaj poezia, pri la unua granda periodo de la latinlingva literaturo. 75,00 gld.

**Atomcentraĵoj** (1974). Roland Levreaud (1919-92). Beauville: SAT-Brosurservo, 1998. 24p. 21cm. Enkonduko al debato pri temo daŭre aktuala. Inkluzive 90-minutan sonkasedon. 15,00 gld.

**Badenlanda legendaro de la Konstanca Lago** (1981). El la germana trad. kaj nove rakontis Benoît Philippe (1959). Dobřichovice: Kava-Pech, 1998. 127p. ISBN 80 85853 39 6. 20cm. Historietoj el la folkloro ĉe la plej granda lago de Germanlingvujo. 17,40 gld.

**Bazaj nocioj en kemio kaj solvo de kemiaj kalkul-problemoj.** Boris Švarc. Gundelfingen: G&M Westermayer, 1996 (2-a, ampleksigita eld.). 44p. ISBN 3 923596 05 7. 21cm. Ekzercoj por studentoj, kun detalaj solvoj. 10,80 gld.


**Beginner's compact dictionary of Esperanto, A.** *With functional grammar and how-to-use instructions.* P.V. Rangana-yakulu (1958). Pune: Federacio E-o de Bharato, 1997. 146p. 22cm. Dudirekta, kun entute ĉ. 10 000 kapvortoj. Nur ekvivalentoj, sen ekzemplofrazoj. 12,00 gld.

**Besto de Vakareso, La** (1926). Joseph d'Arbaud (1874-1950). El la okcitana trad. Jean-Luc Tortel. Dobřichovice: Kava-Pech, 1998. 96 p. ISBN 80-85853 40 X. 20 cm. Rakonto en la formo de taglibro de mezepoka taŭro-gardisto provenca, kiu renkontas mitologiecan estaĵon. Vd. recenzon sur p. 138. 12,00 gld.


**Cashundo de la Baskerviloj, La** (1902). Arthur Conan Doyle (1859-1930). El la angla trad. William Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 1998. 173p. 20cm. Unu el la plej famaj enketoj de la sagaca detektivo Ŝerloko Holms. 18,00 gld.

**Ĉina-Esperanta-angla-franca ĉinmedicina terminaro.** Ĉefred. Gu Jian-hua (1935). Beijing: Ĉina E-Eldonejo, 1997. 607p. ISBN 7 5052 0328 2. 19cm. Lingve kontrolis Li Shijun (Laŭlum). Pli ol 7000 terminoj de la tradicia ĉina medicino, ofte kun detalaj klarigoj. 42,00 gld.

**Dio parolas al siaj infanoj.** *Bibliaj tekstoj.* Eleonore Beck. Ilus. Miren Sorne. Trad. membroj de Franca Katolika E-Asocio. Navarra: Verbo Divino, 1997. 96p. 19cm. Kolora. Bibliaj historioj rakontitaj al infanoj. 9,90 gld.



**Du volumoj: komenco de impona entrepreno traduka kaj eldona.**



**En tiu terura momento.** *Antologio de la nuntempa kroata milita liriko.* Kompilis Ivo Sanader kaj Ante Stamač. Redaktis Dalibor Brozović. El la kroata trad. pluraj. Zagreb: Kroata E-Ligo/Ŝkolska knjiga, 1998. 158p. ISBN 953 96918 1 8. 20cm. 16,50 gld.

**Esperanto post la jaro 2000.** *Diskut-kajeroj 1.* Aleksander Korjenkov (1958). Rotterdam: UEA, 1998. 18p. ISSN 1388-2252. 21cm. Provo distingi bazojn por nia estonta agado. 4,80 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

**Hillélisme, Le. Projet de solution de la question juive** (1901). Lazare Louis Zamenhof. El la rusa kaj E-o tradukis, enkondukis kaj prinotis Pierre Janton. Clermont-Ferrand: Faculté des Lettres, 1995. 132p. 24cm. Franclingva. Apenaŭ konata teksto, pri ebla evoluo de judismo al hilelismo. 37,50 gld.

**Homeopatio: populara orientado.** Izao Carneiro Soares (1944). El la portugala trad. Orlando Raola González, Neusa Priscotin Mendes kaj Amilton Jorge da Costa Reis. Ribeirão Preto: Muzeo de Homeopatio Abrahão Brickmann, 1993. 96p. 21cm. Dulingva

(hispana-Esperanto). Helpo al hejma solvo de simplaj sanproblemoj. 7,50 gld.

**Ilustrovana petojezična terminologija kombinovanog saobraćaja.** Red. kaj trad. en Esperanton kaj la serban Gvozden Sredić. Beograd: JAFE k.a., 1998. 98p. 21cm. Ilustrita terminaro de kombinita transporto en la franca, angla, germana, serba kaj Esperanto. 12,00 gld.

**Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA.** *Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaĵ testoj.* UEA/ILEI, 1998 (2-a eld. reviziita de Atilio Orellana Rojas). 34p. ISBN 92 9017 055 7. 21cm. 6,60 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

**Ivan la malsaĝulo.** Lev Tolstoj (1828-1910). El la rusa trad. V.A. Ŝrikov (ps.); reviziis kaj red. MINE Yositaka, kun konsiloj de TANi Hiroyuki. Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 1998 (5-a, reviziita eld.). 77p. ISBN 4 930785 45 6. 21cm. Ligno-gravuraĵoj de TAKEHANA To. Fabelo pri la venko de simpla boneco super diablaj tentoj. 13,80 gld.

**Kamaradaro de Petro Nodeto, La** (1933). Mato Lovrak (1899-1974). El la kroata trad. Josip Pleadin. Zagreb/Djurdjevac: Kroatia E-Ligo/Matica Hrvatska, 1998. 125p. ISBN 953 97001 3 2. 21cm. Bind. Porinfana romano: infanoj decidas ripari la vilaĝan muelejon. 21,00 gld.

**Katorelo.** *La vivo de kato.* Jeannette van Mens. Ilus. Bep Thijssse. El la nederlanda trad. Coosje Dekker-Kiefer. Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1998. 81p. ISBN 90 71205 74 6. 21cm. Antaŭmiaŭis Marjorie Boulton. 13,80 gld.

**Kelkaj paŝoj en la ok-ĉitana.** Pauleta Averós kaj Ives Bachimont. St. Joan del Falgar: la aŭtoroj, 1998. 61p. ISBN 2 9512505 0 9. 21cm. Enkonduko al la lingvo kaj kulturo de nia kongres-regiono. 10,50 gld.

**Knabo frenezeta, La** (1980). Ziraldo. Ilus. la aŭtoro. El la portugala trad. Kristoĉjo Resende (1988). São Paulo: Melhoramentos, 1998. 106p. ISBN 85 06 50411 2. 23cm. Desegno-rakonto pri petola bubo. 19,80 gld.

**Menade bal pŭki bal.** *Festlibro por la 50a naskiĝ-tago de Reinhard Haupenthal.* Saarbrücken: Edition Iltis, 1998. 487p. ISBN 3 932807 06 5. 21cm. Bind. 45 kontribuantoj pritraktas temojn plejparte esperantologiajn kaj interlingvistikajn. 135,00 gld.

**Mini-guide Esperanto.** Beauville. [1998]. 92p. 21cm. Gramatika kaj konversacia enkonduko por franclingvanoj. 6,00 gld.

**Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić** (1913). Ivana Brlić-Mažuranić (1874-1938). El la kroata trad. Maja Tišljär. Zagreb: Kroatia E-Ligo, 1998. 108p. ISBN 953 96918 2 6. 20cm. La plej fama libro de la "kroata Andersen". 16,50 gld.

sekva paĝo



**Portret idej s ĉudakami vmes to fona, ili Jazyk doktora nadejuŝčegosja.** A.S. Melnikov (1951). Rostov-na-Donu: Rostovskij g. p. universitet, 1997. 160p. ISBN 5 8480 0147 2. 20cm. En la rusa. ("Portreto de ideo kun malordinaruloj anstataŭ fono, aŭ La lingvo de doktoro esperanta"). Seriozaj faktoj pri E-o leĝere prezentitaj. 18,00 gld.

**Rabeno de Baĥaraĥ, La / La rabeno de Bacherach** (1840). Heinrich Heine (1797-1856). El la germana trad. Lazaro Zamenhof / Reinhard Haupenthal. Chapecó: Fonto, 1997. 104p. 21cm. Paralela presado de du tradukoj, el 1914 resp. 1997. Romanfragmento kortuŝa, ironia, pri judoj en mezepoka Germanio. 19,80 gld.

**Sanga nupto** (1933). Federico García Lorca (1898-1936). El la hispana trad. Miguel Fernández. Madrid: Andaluzia E-Unuiĝo/ Hispana E-Federacio, 1998. 118p. ISBN 84 605 7441 5. 18cm. Hispana literaturo n-ro 8. Pasia dramo pri forrabo de fianĉino, kun andaluzia fono sed universala valoro. 15,00 gld.

**Sveda novelaro** (1950). El la sveda trad. Ferenc Szilágyi. Laroque Timbaut. [1996, reeld.]. 235p. 20cm. 20 socitemaj noveloj el la 30-aj kaj 40-aj jaroj, de konataj verkistoj el la laborista medio. 19,80 gld.

**Tempo.** 732 *sonetoj dulingve skribitaj dum 126 tagoj en 1995.* Jan Stanisław Skorupski (1938). Dulingva: E-pola. Zürich: ĉeditio L., 1998. 376p. ISBN 3 9521492 0 9. 15cm. Soneto por ĉiu tago: observoj, notoj, meditoj, memoroj. 30,00 gld.

**Vojaĝo al Kazohinio** (1936). Sándor Szathmári (1897-1974). Paris: SAT, 1998 (2-a eld.). 315p. 20cm. Ĉefverko de nia literaturo. Gulivero post ŝippereo trovas sin en insulo kie vivas du malaj socioj: ĉe la hinoj la tekniko malhomigis la homojn, ĉe la behinoj superregas eksceso "artaj" kaj "religiaj". Kun aŭtoraj klarigoj (1960). 34,50 gld.

**MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,** Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

## KULTURO

### Biblioteka Apogo subvencios duan fojon

En marto (p. 57) ni raportis pri la unua aljuĝo de subvencioj el Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kies bazan kapitalon ges-roj Thorsen pasintjare disponigis al UEA por apogi la pliriĉigon de Esperanto-bibliotekoj. UEA nun atendas subvencipetojn por la dua aljuĝo fine de tiu ĉi jaro.

La Biblioteka Apogo helpas Esperanto-bibliotekojn kiuj ne estas financataj el ŝtata, urba aŭ alia nemovada fonto. Privataj bibliotekoj povas esti konsiderataj nur escepte, se tio estas pravigebla laŭ ilia kvalito kaj se ili estas ĝenerale alireblaj. La subvenciojn oni ricevos en la formo de libroj. Tial



### Bulgario: 40-jariĝo de Bulgara Esperanto-Teatro

La 20-an de majo Bulgara Esperanto-Teatro festis sian 40-jariĝon antaŭ plena salono en la centro de Sofio. Per emocivekaj vortoj kaj lumbildoj Belka Beleva, la motoro de BET, prezentis ĝian historion ekde la fondo en 1958 tra partopreno en 22 Universalaj kaj multaj aliaj kongresoj ĝis nun. Poste Nikolaj Uzunov, Teo Jurukov, Luna Davidova kaj Veneta Zjumbjuleva prezentis la unuaktaĵon *Budapeŝta ekzameno* de Sándor Szathmári, reĝisoritan de Teo Jurukov. Salutojn sendis dekoj da esperantistaj individuoj kaj organizaĵoj. BET ricevis la distingon Ora Stelo de la Asocio de Bulgaraj Geaktoroj, kaj Bulgara Esperanto-Asocio honorigis ĉiujn geaktorojn per ora insigno. (M. Evlogieva)

### • Madagaskaro: Unuiĝo fondita

La 6-an de apr. laŭleĝe fondiĝis Malagasa E-Unuiĝo, kies statuton kreis tutlanda E-renkontiĝo en aŭg. 1997. Ĝis nun kluboj, asocioj kaj unuopuloj rilatis ĉiu aparte kun UEA, sen tegmenta organizaĵo harmoniiga. (*Inter Ni*)



Artistoj de BET post provludo

### • Rusio: Memore al Lena

Dum sia 10-jara ekzisto, la festivalo EoLA ("Esperanto — Lingvo Arta") kreskis el renkontiĝo por e-istoj apud Volgo al translime renoma aranĝo por surscenejaj artoj. La pasinta, 10-a EoLA (27 feb.-1 marto, Ivanovo) estis dediĉita al la memoro de la tro frue mortinta (1965-97) Lena Lebedeva (vd. apr. '97, p. 80). Ĉi tiu plej vizitata EoLA (192 personoj el 8 landoj) allogis multe da artistoj, eĉ muzikiston JoMo el Francio. Ĉe <http://www.gs707>.



**Sergej Bozin, blus-kantisto kaj rokenrolisto el Krasnojarsk. Fone: la festivala emblemo kun la vizaĝo de Lena.**

la subvenci-peton devas akompani listo de dezirataj libroj, ordigitaj laŭ prefero.

En 1997 sume 3500 gld. estis dividitaj inter 9 el la 21 bibliotekoj kiuj submetis peton. La valoro de la subvencioj iris de 200 ĝis 600 gld. Unuopaj subvencioj verŝajne estos de sama grandeco ankaŭ ĉi-jare, sed la tuta disponebla sumo kreskos ĝis ĉ. 4250 gld. La subvencipetoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro 1998.



## • Pollando: Vicministra vizito

La 12-an de marto neatendite vizitis E-klubkunvenon en Radom la vicministro pri kulturo, Jacek Weiss. Tiun tagon okazis en la klubo vaste anoncita prov-leciono por interesatoj, kun ĉ. 30 ĉeestantoj. (*Eventoj*)



Foto: Komitato de Beĉka Beleva

com/esperanto/eola-10/eola\_index.htm videblas ĉ. 150 EoLA-fotoj kaj eĉ aŭdeblas plena koncerto. La sekva EoLA okazos en marto 1999, en Kievo (vd. "Kalendaro", p. 130). (G. Arosjev, A. Ananjin)

## • Literaturo: Inspiro sen sakroj

La oka romano de la sveda verkisto Per Holmer (1951-) komenciĝas per la frazo "Oni ne povas sakri en Esperanto". Malgraŭ tiu erareto, nia lingvo ludas ne malgrandan rolon en la romano *Svindel* ("Vertiĝo") por pentri Eŭropon en la jaroj 1914-1933: ekz. en 1914 la protagonisto vojaĝas el sia germana hejmurbo al la ne-okazonta Pariza UK. Holmer pli frue verkis libron pri la sveda anarkisto-esperantisto Einar Håkansson. (*La Espero*)

## • Muziko: Kajto festis dekjariĝon

En Paska Renkontiĝo (10-13 apr., Broek) de la nederlanda kaj flandra junularaj E-asocioj, la popolmuzika grupo Kajto festis sian dekan datrevenon: unuafoje ĝi koncertis same en Frislando, dum Paska Renkontiĝo (1988). Ĉe la surloka surbendigo de la nova Kajto-disko (la kvara en Esperanto) kiel koruso servis la 50 partoprenantoj (el 6 landoj). La kvaropo koncertas kaj eldonas diskojn ankaŭ frise kaj nederlande, sub la nomo Kat yn 't Seil. (M. Sloper)

## Kajto lanĉos sian kvaran E-diskon



Foto: Arkivo de UEA

## • Interlingvistiko: Samrajta ĉeesto

Tro maloftas samrajta kaj efika reprezentiĝo de interlingvistiko aŭ esperantologio en profesiaj lingvistikaj konferencoj. Ekzemplodone esceptis la 8. Hungaria Konferenco pri Aplikata Lingvistiko (16-18 apr., Szombathely), kie pli ol 400 partoprenantoj debatis en 22 sekcioj kaj prezentis ĉ. 300 prelegojn, laŭ la kadra temo "Lingvo kiel intelekta kaj ekonomia kapitalo".

La ĉ. 20 interlingvistoj agadis precipe (sed ne nur) en propra sekcio. Prelegis I. Koutny (Fonetikaj aspektoj de E-o), P. Murányi (La vorto *Esperanto* en komputilaj datumbazoj), O. Prytz (Lingva komunikado kiel problemsolvado), Á. Rátkai (Komenco de la hungara E-movado), G. Silber (La e-istaro: ĉu lingva minoritato?),

K. Smidéliusz (Internaciaj eksperimentoj pri la propedeŭtika valoro de E-o), Z. Varga-Haszonits (Lingvistikaj konceptoj de István Szerdahelyi), B. Wacha (Duagradaj funkcioj de gramatikaj rimedoj en E-o) kaj D. Blanke (Eugen Wüster kaj la naturalisma skolo). Tri interlingvistoj prezentis prelegojn ankaŭ en aliaj sekcioj: Koutny pri temvortaroj en "La hungara kiel fremda lingvo", Rátkai pri lingva diskriminacio en "Lingvopolitiko" kaj Blanke pri rilatoj inter terminologi-scienco kaj *Enciklopedia Vortaro* de Wüster en "Leksikologio/leksikografio". Ronda tablo estis dediĉita al István Szerdahelyi.

La prelegoj parte aperos en konferencaj aktoj. La interlingvistikan sekcion kompetente organizis d-rino Katalin Smidéliusz. (D. Blanke)

## AKADEMIO DE ESPERANTO

### Nova estraro

Geraldo Mattos estis elektita prezidanto de la Akademio de Esperanto per 27 voĉoj, kontraŭ 10 voĉoj por Perla Ari-Martinelli. Kiel vicprezidantoj elektigis Christer Kiselman (25 voĉoj) kaj Michel Duc Goninaz (21); kiel sekretario Renato Corsetti (34). La aliaj kandidatoj por estraraneco (ĉiuj por vicprezidenteco) estis Donald Broadribb (7 voĉoj), Carmel Mallia (3) kaj Amri Wandel (8). El la 43 akademianoj 37 partoprenis la voĉdonon.

Ĝis nun la estrarajn funkciojn plenumis Werner Bormann (prezidanto), Gerrit Berveling kaj Gonçalo Neves (ambaŭ vicprezidantoj, Berveling nur ĝis demisio en aprilo 1997) kaj Perla Martinelli (sekretario). (NUN, W. Bormann)



**Kun viaj kontribuaĵoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi fotas aŭ disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Freŝdataj portretoj de aktivaj esperantistoj estas aparte bonvenaj. Koran dankon!**





## • Cunningham: Israela renkonto

Fine de junio Denis Cunningham, prezidanto de Internacia Federacio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj (FIPLV) — kiu reprezentis Uneskon en la Ade-lajda UK — vizitis konferencon en Jerusalemo kaj renkontis tie estraron A. Wandel. FIPLV kaj UEA jam informe interŝanĝas eldonaĵojn, kaj Cunningham sendos saluton al la Montpeliera UK. (A. Wandel)

## • Gorov 90-jara

Ni gratulas al Ĥristo Gorov, kiu fariĝis 90-jara la 18-an de julio. Konata pseŭdonime kiel Ĥrima, Gorov aperigis 13 librojn en la bulgara kaj 4 en Esperanto (i.a. *Poemo de l' plugisto*, 1930, el kiu *Sennacieca Revuo* ĵus reaperigis du poemojn; *Ribela kordo*, 1983; kaj *Mia verda pado*, 1985), redaktis kaj kompilis multajn E-tradukojn el la bulgara, kiel *Bulgara nuntempa poezio kaj prozo* (1985). Malliberigita en 1935 pro laborista E-agado, partizano en la dua mondmilito, Gorov laboris en la

postmilita reĝimo kiel partia aparatano. Dum jardekoj li servis en la estraro de Bulgara E-Asocio, inter 1960-1964 kaj 1976-1987 kiel prezidanto. Sub lia gvidado BEA gajnis la Premion Fyne de UEA.

## • Nanovfszky: Dojeno prelegis

La ambasadoro de Hungario kaj dojeno de la diplomataro en Moskvo, esperantisto prof. d-ro György Nanovfszky prelegis anglalingve, la 6-an de julio, antaŭ ekonomikistoj en la

## • Nemere: 200 titoloj

István Nemere, la plej fekunda Esperanta romanisto, publikigis sian 200-an hungarlingvan titolon en aprilo. (*Heroldo*)

Kiam nia revuo intervjuis lin antaŭ 5 jaroj (jun. '93, p. 102), li estis publikiginta 150 titolojn en la hungara. Dum la sama kvinjara periodo lia E-verkaro kreskis de 14 al 16 titoloj.

## • Reiersøl: 90-jara

La 28-an de junio 90-jariĝis Olav Reiersøl, emerita profesoro pri statistiko, kiu donis gravan kontribuon al la matematika terminaro en Esperanto. Gratulon al nia dumviva membro, fidela ano de Societo Zamenhof.

## Mercej: La nevideblaj manoj

Ordo kaj pureco en la CO preskaŭ ne eblus sen la feraj manoj de geedzoj Ina kaj Wim Mercej (sidantaj dekstre), kiuj jam pli ol tri jardekojn prizorgas purigadon en fruaj matenoj. (Ina Mercej estas la plej longserva oficisto!) Jen oficistoj kaj volontuloj festetas ilian 40-jaran geedzecon.



Foto: M. Reza Torabi

Berlina Universitato Humboldt, pri la rilatoj de orient-eŭropaj landoj al la landoj eks-sovetiaj. Fine de sia prelego Nanovfszky menciis sian esperantistecon kaj la Berlinan UK. (*Berlina Informilo*)

Semajnon pli frue Nanovfszky estis elektita kiel prezidanto de Hungaria E-Asocio, de ties delegitara kunsido (27 jun., Budapeŝto), por kvar jaroj.

magazino *Le Nouvel Observateur*. Al demando pri lia gepatra lingvo, Rodinson, konanta tridekon da lingvoj, respondis jene: "En familia rondo miaj gepatroj parolis inter si la jidan, sed ili parolis ankaŭ la francan. [Rodinson estas filo de judaj enmigrintoj el Rusio kaj Pollando — *Red.*] Kaj ili neniam instruis sian lingvon, nek al mia fratinino nek al mi. Male, mi lernis Esperan-

## OFICIALA INFORMILO

### NOVA DUMVIVA MEMBRO

Danio: Peter Weide.

### PATRONOJ DE TEJO 1998

Francio: André C.J. Gaillard; Pierre Lelièvre; Renée Triolle. Hungario: Péter Pál Denke. Nederlando: W.F. Huppertz.

### SOCIETO ZAMENHOF 1998

Francio: André C.J. Gaillard; Jeannine Vincent. Germanio: Helga Erhard. Hispanio: Josep Castellort i Riba. Hungario: Péter Pál Denke. Japanio: Akira Morita. Kanado: Brian D. Kaneen. Nederlando: A.J. Bakker-ten Hagen; Hans Bakker; Ru H. Bossong. Usono: Milton O. Brown.

### DONACOJ 1998 (NLG)

ĝis la 30-a de junio

**Asocia Kapitalo:** Nederlando: heredaĵo A.S.J. van Duuren 33 375,00. Sumo ĉi-jara: 48 488,66.

**Fondaĵo Afriko:** anonime 7500,00. Britio: K. Hall 83,55. Nederlando: Memore al W.P. Roelofs 1200,00; F.J. Pieterse 100,00. Svedio: J. Hammarberg 25,75; A. Dagmarsdotter 144,06. Sumo ĉi-jara: 14 375,20.

**Fondaĵo Ameriko:** Belgio: J.C. Thumerelle 54,38. Brazilo: M.P. Almada 980,20; S. Schenk Ledon 101,00. Finnlando: kolektis A. Harju

74,20; Saliko 111,00. Hungario: P.P. Denke 107,84. Meksiko: Meksika E-Federacio 289,67. Nederlando: Fam. Bossong 50,00; Memore al W.P. Roelofs 400,00. Svedio: A. Bergh 128,75. Svislando: G. Eggenberger 128,00. Usono: D. Holland 201,73; B. Maxey 380,40. Venezuelo: J.E. Bachrich 200,50. Sumo ĉi-jara: 3742,56. **Fondaĵo Azio:** Japanio: Y. Aida 30,26; S. Aikawa 60,52; Y. Akada 151,30; H. Inumaru 30,26; K. Kazawa 30,26; S. Koga 28,06; T. Konisi 90,78; Y. Kuroyanagi 60,52; K. Matoba 28,06; Y. Misawa 56,12; Y. Miwa 1513,00; I. Miyamoto 30,26; T. Nakamiti 60,52; S. Oonisi



**TANZANIA MASONISTO** 25-jara, fraŭlo, dungita de dana konstru-kompanio, volas korespondi kun samfakuloj. Augustine Y. Hizza, c/o Stivin Kauzen, P.O.Box 3733, Zanzibar, Tanzanio.

**LA PIONIRA AFGANA** e-isto d-ro Hejdar Rašidi (vd. apr., p. 64) kontakteblas ĉe la adreso: Torbate Jam 95715-18, Irano.

**RIFUĜINTO EL EKSA ZAIRIO**, estro de homrajta kaj eduka centro, deziras E-kontaktojn: Ahombo Scoty Okoko, P.O. Box 612, Kigoma, Tanzanio; ☎+255/695/3758; ✉caritas-kgm@maf.org.

**TRE POPULARA** estas Esperanto en klaso de 18 italaj gelerantoj 12-jaraj. Skribu al ili, kun belaj poŝtmarkoj: Klaso 2/B, Scuola Media "Dante Alighieri", IT-63100 Cupramarittima, Ascoli Piceno, Italio.

**FRAŬLINOJ 22- KAJ 20-JARA**, novaj esperantistinoj, interesiĝas pri bildkartoj, modrevuoj kaj vojaĝoj, gastigemas reciproke: Saška (sur la foto) kaj Evgenia Luleova, Banja Razlojka, Obština, Bulgario.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.



## ANONCETOJ



**NOVAJ ESPERANTISTOJ** deziras korespondi kun samideanoj tutmonde pri ĉiuj temoj. Bv. skribi al Esperanto-Klubo de Nikaragvo, Eddy Silva Molina, Sucursal Ciudad Jardin, Apartado Postal T-67, Managua 12, Nikaragvo.

**"PORTRETO DE IDEO** kun malordinaruloj anstataŭ fono", estas ruslingva libro de Aleksandr Melnikov (vd. p. 140). Jam 5 gld. al UEA-konto "meln-w" sufiĉas por donaci ĝin al viaj geamikoj en eks-Sovetio, kaj pere de ili al publikaj bibliotekoj, amasinformiloj ktp. Kontakto la aŭtoron: p.k. 393, RU-344007 Rostov-na-Donu 7, Rusio.

**NIKARAGVA JUNULO** korespondema: Alex Pérez Mendieta, Funeraria El Amparo 1y 1/2 al sur, B° El Paraisito, Managua, Nikaragvo.

**EMAS KORESPONDI** s-ino Néli-da Monasterio, Avellaneda 76, AR-6550 Bolívar, Argentino.

**EN JUNIO LA MAGAZINO MONATO** informis pri mia demisio kiel ĝia literatura redaktoro, sed ĝi malvere prezentis la kialon de mia ekŝigo. Neniam kaj nenie mi "postulis, ke *Monato* informu siajn legantojn pri la vera nomo malantaŭ la pseŭdonimo Paula Mährti". Tia postulo estus tute nerealeca. Mi postulis, ke *Monato* informu siajn legantojn, ke la recenzinto eraris, kaj Paula Mährti nepre NE estas P. Martinelli. Kiam la magazino rifuzis fari tion, mi demisiis proteste. Miaj legantoj bonvolu tion kompreni. W. Auld, Dollar, Skotlando.

**53-JARA KOMENCANTO ETERNA** deziras korespondi tutmonde. Johano Vluchtman, Olijvenstraat 1, NL-6412 WK Heerlen, Nederlando.

ton en tre frua aĝo. Tiutempe ĝi estis laŭmoda. Mi studis la aferon ĉar en Sovetio ekzistis periodo de entuziasmo pri E-o. Poste Stalino zorgis ordigi la aferon. Ĝi estis tro internacia por li.

Ĉu vi parolas Esperanton?

Mi kapablas legi ĝin kaj, kun fojfoja uzo de vortareto, ankaŭ skribi. Estas vere tre facile. Zamenhof estis genio." (R. Jullien, V. Charlot)

### • Vokal: Viena adiaŭo

Post pli ol 50 jaroj da aktivado ĉe la E-Redakcio de ORF-Radio Aŭstria Internacia, la 82-jara Emil Vokal oficiale pensiigis la 31-an de majo. En la ĉi-okaza festeto, la 27-an de majo, paroladis la ORF-intendanto Paul Lendvai kaj, flanke de Aŭstria E-ista Federacio, ties prezidanto Hans Michael Maitzen, kiu nomis la festanton "la voĉo de Aŭstrio en Esperantio". (K. Fetes-Tosegi)

Gratulon al s-ano Vokal, kies voĉon ni tamen supozeble plu aŭdos, de tempo al tempo, el Vieno.



Foto: Arkivo de UEA

### OFICIALA INFORMILO

30,26; R. Samura 60,52; T. Sugano 30,26; H. Takubo 60,52; M. Tamura 28,34; T. Taniguti 30,26; S. Yamasaki 30,26. Sumo ĉi-jara: 4133,61.  
**Fondaĵo Canuto:** Brazilo: R. de Morães Felipe 46,80; M. Rolim Cândido 18,90. Britio: P. Danning 100,00. Francio: A.C.J. Gaillard 134,44. Italio: M.F. Pagliaroli 15,00. Nederlando: F.J. Pieterse 100,00; Memore al W.P. Roelofs 400,00. Svedio: Norrköpings E-Klubo 200,85. Sumo ĉi-jara: 7844,11.  
**Fondaĵo Grabowski:** Nederlando: O. T. Buller 101,19. Pollando: A. Goralski 541,74. Sumo ĉi-jara: 842,93.

**Konto Espero:** Nederlando: Memore al W.P. Roelofs 400,00. Sumo ĉi-jara: 562,48.  
**Junulara Fondaĵo:** Germanio: U.J. Moritz 215,58. Svedio: U. Luin 100,00. Sumo ĉi-jara: 2109,78.  
**Triamonda Kongresa Fondaĵo:** Britio: P. Danning 100,00. Nederlando: Memore al W.P. Roelofs 400,00. Sumo ĉi-jara: 803,76.  
**Volontula Fondaĵo:** Britio: P. Danning 100,00. Francio: A.C.J. Gaillard 134,44. Nederlando: F.J. Pieterse-Krueger 100,00. Sumo ĉi-jara: 1812,55.  
**Kampanjo 2000:** Aŭstralio: K. Enderby 190,20. Belgio: F. Witdoeck 546,25. Brazilo: F.M.A.

5881,19. Italio: M.F. Pagliaroli 15,00. Japanio: Oomoto 9926,25. Kanado: U.P. Ronald 34,20. Korea Resp.: Hong Du Choe 194,66; U. Kim 100,00; Yung-myung Kim 389,31. Nederlando: Esperanto Nederland 900,00; memore al N. Moerbeek 80,00; memore al N. Moerbeek 134,00; E-Klubo Nijmegen 50,00. Sumo ĉi-jara: 25 710,65.  
**Ĝenerala Kaso:** Francio: M. Feneyrol (por Soc. Zamenhof) 1671,62. Nederlando: G.F. Makkink 125,00; H. Velsink 11,88. Sumo ĉi-jara: 4028,59.

*Al ĉiuj tre koran dankon! UEA*



# Nekrologoj

**René DEBERNARDI** (1923-1997) mortis la 30-an de decembro en Nico (Francio). E-isto 50 jarojn, subtenanto de mondcivitanismo, en la 60-aj jaroj li estis prezidanto de la Nica E-grupo, kaj tiutempe ankaŭ loka delegito.

**Earl GALVIN** (1946-1998), aktivulo de la geja E-movado, forpasis la 14-an de januaro en San-Francisko. Lia traduko de la romano *La kanto de l' kolimbo* de Richard Amory atendas eldonon.



**Idyss EINIHOVICI** (1904-1998) mortis la 29-an de majo en Perto (Aŭstralio). Patrono de TEJO, honora membro de ILEI, ŝi kun sia edzo (forpasinta en 1988) aktivis pli ol 50 jarojn por E-o. Ŝi malavare subtenis diversajn projektojn, i.a. E-instruadon (de Trevor Steele) en loka lernejo kaj partoprenon de aŭstralianoj en Internaciaj Infanaj Kongresetoj. Ŝi regule iris al UK, eĉ 90-jara.

**Johann HAUPT** (1913-1996) forpasis antaŭ du jaroj en Quedlinburg (Germanio). En 1947 li kunfondis kaj komence prezidis Asocion E-istan en la Soveta Zono. En GDR li aktivis ankaŭ dum la tempoj kiam Esperanto ne estis favorata, kaj des pli post la oficialigo de la Esperanto-agado en 1965.

**W.J.A. MANDERS** (1910-1998) mortis la 17-an de januaro en Venray (Nederlando). Menciita jam en *Enciklopedio de Esperanto* (1933), li iĝis konata pro sia samjara proza traduko el *Odisseado*, siaj interlingvistikaj verkoj: doktoriĝa disertacio komparanta Volapukon, Esperanton, Idon, Occidental kaj Novial (*Vijf Kunsttalen*, 1947) kaj la problem-stariga monografio *Interlingvistiko kaj Esperantologio* (1950), same kiel pro sia lernolibro *Esperanto leerboek* (kun C.B. Zondervan, 1952), kiu atingis sep eldonojn ĝis 1995. Manders estis akademiano inter 1954 kaj 1962.

**Ján MUŽLAY** (1909-1997), esperantisto dum 80 jaroj, longtempa gvidinto de la E-klubo en Nitra (Slovakio), kiu kompilis la eldonotajn lernolibron *Maŝin-elementoj* kaj Esperantan-slovakajn teknikajn vortaron, mortis la 30-an de decembro.

**József PÁVA** (1914-1998), 60 jarojn esperantisto, kunfondinto

de E-Klubo Minista en Tokodaltáró (Hungario), doktoro pri esperantologio (1985), forpasis la 23-an de aprilo.

**Marcel TERNANT** (1918-1998), aktivulo de SAT, membro de Franca E-Instituto, respondeculo de korespondanta kurso de SAT-Amikaro, regula kursgvidinto, forpasis la 20-an de aprilo en Épinay-sur-Seine. Li verkis kaj tradukis teatraĵojn, poemojn kaj kanzonojn.



**Ernesto VÁÑA**

**Ernesto VÁÑA** (1909-1998) mortis en Dudince (Slovakio) la 19-an de marto. Kiel naŭjara infano li lernis Esperanton kaj konatiĝis kun knabeto Tibor Sekelj. Li membris en UEA de la komencaj 30-aj jaroj, kaj en 1946 li iĝis dumviva membro. En la sama jaro li eldonis propran lernolibron por slovakoj kaj fondis la gazeton *Esperantisto Slovaka*. Dum jardekoj li organizis somerajn E-lernejojn en Dudince, kie en 1947 li fondis E-kooperativon, aĉetinte tiucele 50-hektaran farmon, konfiskotan de la ŝtato; antaŭ nelonge li ricevis la bienon kaj, malgraŭ grava malsano, klopodis reordigi ĝin por movadaj celoj.

Váňa estis dum jardekoj delegito pri banlokaj aferoj, aŭtomobila turismo kaj vegetarismo. Sindediĉa vegetarano, en 1971 li revivigis kaj dum multaj jaroj prezidis Tutmondan Esperantistan Vegetaranan Asocion kaj redaktis (kun Christopher Fettes) ties organon *Esperantista Vegetarano*: meritoj pro kiuj li fariĝis honora prezidanto de TEVA.

Váňa estis dum jardekoj delegito pri banlokaj aferoj, aŭtomobila turismo kaj vegetarismo. Sindediĉa vegetarano, en 1971 li revivigis kaj dum multaj jaroj prezidis Tutmondan Esperantistan Vegetaranan Asocion kaj redaktis (kun Christopher Fettes) ties organon *Esperantista Vegetarano*: meritoj pro kiuj li fariĝis honora prezidanto de TEVA.

## Estraro de UEA

**Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj):** prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-765-0880 [h], +82-53-652-4488 [of]; ☎ +82-53-652-8141 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

**Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo):** s-ino Renée Triolle, Bello Bauco, Chemin de la Civate Verde, FR-13600 La Ciotat, Francio.

**Ĝenerala Sekretario:** s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ☎ +39-6-39-72-61-69; ✉ mc8750@molink.it.

**Estrarano (financo, administrado):** d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎ +31-50-3613763 [of]; ✉ A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

**Estrarano (eksteraj rilatoj, CED):** s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ☎ +1-613-565-9279; ✉ mfettes@magi.com.

**Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio):** s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-223748 [h], +370-7-209781 [of]; ☎ +370-7-228616 [of].

**Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo):** prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎ +972-2-658-4437 [of]; ✉ amri@vms.huji.ac.il.

**Komitato de UEA:** Jarlibro 1998 enhavas liston de ĉiuj komitatanoj (vd. p. 19-23).



Cent jaroj (1896-1996) da stratoj, placoj, monumentoj, bustoj, kulturcentroj, tabuloj, parkoj, pontoj, asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER

## Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdam: UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabuloj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo: 18,00 gld. (Triona rabato ekde 3 ekz.)



## ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.



Koresponda Servo Mondskala  
B.P. 6  
FR-55000 Longeville-en-Barrois  
Francio



# SIMPLE LA PLEJ BONA!

SESA ELDONO  
DE LA  
INTERNACIA  
LERNOLIBRO



Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: 24,00 gld.  
Sonkasedo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.



## La Jarlibro akompanos vin tra tuta jaro... donu taŭgan veston al ĝi!

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin kontraŭ 1,80 gld. (+ afranko kaj, ene de EU, imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.

## Memorilo honore al Bill kaj Cathy Schulze

Por honori Cathy je ŝia 85a naskiĝtago la 4an de novembro 1998, sendu historieton, seriozan aŭ humuran, pri Cathy kaj Vilĉjo (+1993) en Esperanto aŭ la angla. Menciuj la jaron kaj okazon, se vi memoras. Se eblas, kreu vian propran paĝon (paĝojn) kun viaj rakontoj, desegnoj aŭ fotoj. Sendu kiel eble plej rapide al: Dori Vallon Wheeler, P.O. Box 74, Goldendale WA 98620, Usono; [dvwheeler@gorge.net](mailto:dvwheeler@gorge.net); ☎509-773-4177.

## Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

## LIBRO DE AMO

"Leganto, se vi estas pruda  
Kaj naŭzas vin la amo nuda ..."

... tiam nepre ne aĉetu ĉi tiun faman majstroverkon de la Esperanta erotika poezio, kiu malkovris al tiom da geesperantistoj la misteron kaj belon de sekso.

Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Byblos: Je la ŝildanonco de "L'Akacio", 1969. 262p. 20cm. Enhavas la senpudoran *Sekretaj sonetoj* (1931) k.a. Prezo: 21,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

## Patrina koro

Simplaj, romantikaj  
rakontoj pri la  
esperantista vivo

Nevena Nedelčeva. Rotterdam / La Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eld./preso). 148p. 17 cm. Prezo: 12,00 gld.  
Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.



# WINNIE-LA-PU

...en Esperanto!



Traduko de Ivy Kellerman  
Reed kaj Ralph A. Lewin kun  
enkonduko kaj vortolisto por  
anglalingvanoj. Ilustraĵoj de  
Ernest H. Shepard.

Eldonis UEA: 1992. Tole bindita  
kun kromkovrilo. Prezo: 27,00 gld.  
Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

## KONKURSO POR ĈIUJ

Ĝin organizas ILEI-Komisiono pri Konkursoj,  
kiu havas post si ok-jaran sperton.

De oktobro ĝis aprilo po unu taskofolieto monate  
kun 7-8 demandoj.

Se vi volas amuziĝi, ludi kaj kontroli vian lingvoscion,  
ne preterlasu la okazon.

Detalojn vi trovas en la regularo.

Petu ĝin rekte de la ĉeforganizanto:


Géza KURUCZ, Hítel u. 10. fszt. 16,  
HU-6000 Kecskemét, Hungario.

Bonvenon en la Internacia Poentokelekta  
E-Konkurso honore al István Szerdahelyi.

## Jen la plej

vaste legata junulara gazeto  
rekomendinda por komencantoj  
bela kaj moderna  
diversa kaj amuza  
interesa por ĉiuj

**KŬIATKO** estas gazeto  
por ĉiu kiu serĉas interesan  
legaĵon en Esperanto. Ĉiu  
numero havas ankaŭ tekstojn  
en tre facila lingvo, tiel ke  
**KŬIATKO** estas aparte taŭga  
por komencantoj kaj por  
Esperanto-kursoj. Krome,  
konkurso atendas vin en  
ĉiu numero de la revuo!  
Ĉi-jare **KŬIATKO** aperos  
6-foje. Abonu rekte de UEA  
aŭ ĉe via kotizperanto.



### ABONTARIFO 1998

|           |              |          |              |             |              |
|-----------|--------------|----------|--------------|-------------|--------------|
| Aŭstralio | 28 dolaroj   | Francio  | 120 frankoj  | Nederlando  | 39 guldenoj  |
| Aŭstrio   | 250 ŝilingoj | Germanio | 35 markoj    | Norvegio    | 140 kronoj   |
| Belgio    | 730 frankoj  | Hispanio | 2200 pesetoj | Pollando    | 20 guldenoj  |
| Brazilo   | 20 guldenoj  | Israelo  | 30 guldenoj  | Portugallio | 2400 eskudoj |
| Britio    | 15 pundoj    | Italio   | 32000 liroj  | Svedio      | 150 kronoj   |
| Danio     | 130 kronoj   | Japanio  | 2600 enoj    | Svislando   | 28 frankoj   |
| Finnlando | 105 markoj   | Kanado   | 29 dolaroj   | Usono       | 22 dolaroj   |

**Granda rabato por grupaj abonoj  
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**



En 1997 242 esperantistoj subtenis  
la agadon de UEA per aliĝo al

## Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de  
mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la  
prezidanto de UEA, inviton al akcepto en  
UK kaj donaceton kun la Jarlibro,  
kiu en 1998 estas bela SZ-kalkulilo.  
La kotizon (duoblo de MA por via  
lando) vi povas pagi al via peranto  
aŭ rekte al UEA.



## Rikolto de 50 jaroj

"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de  
mia serioza verkado en Esperanto.  
La ĉefa rikolto de tiu verkado estas  
la kvindeko de miaj libroj (ankoraŭ  
plimultiĝonta) sur breto en mia  
biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado  
postrestas surkampe pajleroj kaj  
stoploj, kiujn oni kutime forbalaas  
aŭ surtretas. — Mi do decidis kolekti  
libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne  
havas valoron pli ol nur efemeran,  
kaj jen la rezulto. Ekzemple, dum  
mia vivo mi verkis verŝajne centojn  
da librecoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo  
al tempo mi pliprofundigis en la koncerna afero, kaj la  
rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literaturesplora laboro.  
Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)




**La libro estas aranĝita en kvar sekcioj:  
Eseoj, Rakontoj, Tradukoj, Libro-kulturo.  
Tre bela grafika prezento.**

PAJLEROJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj. William Auld.  
Rotterdam: UEA, 1997. 348p. ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: 42,00 gld.

## POR LERNI KAJ ARGUMENTI

Ĉu la lingvopolitiko de internaciaj  
organizaĵoj utilas nur por simbolaj  
politikaj celoj? Ĉu aktualaj modeloj de  
plurlingva demokratio efektive diskri-  
minacias? Kian rolon ludu lokaj lingvoj  
en la solvado de mondaj problemoj?  
Kion eblas lerni el la sperto pri Espe-  
ranto? Ĉiu kontribuaĵo en la originala  
lingvo (angla, franca aŭ Esperanto),  
kun resumo en ĉiuj tri lingvoj. La angla  
teksto de la pionira raporto "Espe-  
ranto kaj la lingva demando ĉe Ligo de  
Nacioj" de NITIBE Inazō estas unuafoje  
publikigita ĉi-libre.



AL LINGVA DEMOKRATIO / TOWARDS LINGUISTIC DEMOCRACY / VERS LA DÉMOCRATIE  
LINGUISTIQUE. Aktoj de la Nitobe-Simpozio, Prago, 1996. Mark Fettes kaj Suzanne  
Bolduc (red.). Rotterdam: UEA, 1998. 212p. ISBN 92 9017 054 9. 24cm. Prezo: 22,50 gld.